



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Septembro 2020 n-ro: 57



Merhaba,

Yaz geldi geçiyor, ardından sonbahar gelecek, havalar soğuyacak ve grip mevsimi başlayacak. Belki koronavirüs tekrar atağa kalkacak ve pandeminin beklenen ikinci dalga gelecek. Bu dönemde grip ile covid-19'un karışmaması hepimizin hayrına olacaktır. Doktorlar uyarıyor ve herkesin grip ve kritik yaşta olanların zatürre aşılarını yapmasında fayda olduğunu söylüyorlar. Sizlere düşen maskenizi takıp etrafta o şekilde dolaşmanız, sosyal mesafenizi korumaya çalışmanız.

Bu zor zamanda dergimizi okuyarak evde daha fazla zaman geçirmeye çalışın. Bunun için bu ayki sayımızda da bir sizlere birinden ilginç yazılar bulduk, derledik.

Hepinize iyi okumalar !


Saluton,

Somero venis kaj baldaŭ foriros, poste venos printempo, la vetero malvarmiĝos kaj komenciĝos la gripo-sezono. Eble la kronviruso denove kuratakos kaj venos la atendata dua ondo de la pandemio. En ĉi tiu periodo estus pli bone se gripo kaj kovim-19 ne intermiksiĝos. La kuracistoj avertas kaj proponas, ke ĉiuj faru la gripo-vakcinon kaj tiuj, kiuj estas en kritika aĝo faru ankaŭ la pneŭmonio-vakcinon. Tio, kio restas por vi estas, ke vi surhavu vian maskon kaj vagu tiel en via ĉirkaŭaĵo, kaj provu teni vian socian distancon.

En tiu malfacila tempo vi provu resti pli longe en via hejmo legante nian revuon. Pro tio ni trovis kaj kolektis por vi tre interesajn tekstojn en nia ĉi tiu numero.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	5
FRIKSO kaj HELA (ΦΡΙΞΟΣ και ΕΛΛΗ)	
JAZONO kaj MEDEA (ΙΑΣΩΝ και ΜΗΔΕΙΑ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	10
Maljuna viro kaj liaj du filoj	11
Korniko kaj vulpoj	12
Ambasadoroj el Aleksandrio	
(Πρέσβεις απ' την Αλεξάνδρεια)	12
Esperanta Infanlibro de Julian Modest	12
La Kimero - Rakonto el la estonteco (4)	13
Ŝercoj tradukitaj de Antanas Vaitkevičius	13
El la literaturaj paĝoj de MAS	14
Astrologio kontraŭ Psikologio -	
Septembro/Virgulinoj	16
El la libro de "Dao de Jing" (48)	17
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	17
Afrikana studento (1982)	18
Amuza Matematiko	18
Ŝercoj	19
Kurcvortenigmo	19
Rablo-muroj (novelo-elĉerpaĵo, 1a ĉapitro)	20
Hajkoj	21
Antaŭ militaj jaroj miaj	22
Al la gesamideanoj!	23
Mia vojaĝo en tundron	24
Tra la padoj de la vivo	25
Ĝojan 75 jaran naskiĝtagon!	25
Dek tri manieroj rigardi merlon	26
75-jariĝo de la fino de la Okinava Batalo (1)	27
Rekvietago	28
Logos	29
Por venki rugbeajn miksbatalojn...	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

Arbo Zelkovo
el fama familio.
Arbo grandega.
Minacata specio,
pro nia apatio.



Vulpo -Azami -
ĉu vulpa nutraĵo aŭ
drogo kuracil'?
La Natur' zorgas ĉiujn.
La bestoj sin ne trompas...



Knabin' en parko
muzikas per trumpeto.
Muzika ĉarmo.
La muziko pacigas,
eĉ la arboj ĝin shatas.



Per senvorta peto
en la tristaj okuloj,
nin rigardas senkulpe
la strataj senhejmuloj.



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La **64-a Internacia Esperanto-Sumoo** okazis inter la **12-a kaj 26-a de julio**.

Analizo:

Partoprenantoj: 345 el 34 landoj

La tuta **numero de partoprenantoj** en la lasta jaro estis 12.572 homoj (2009.9-2020.7)

Laŭlandaj nombroj:

1. Japanio: 70
2. Ĉinio: 53
3. Brazilo: 41
4. Francio: 31
5. Pollando: 18
6. Germanio: 17
7. Rusio: 16
8. Italio: 11
9. Britujo: 9
10. Nepalo: 8
-
29. Turkio: 1
-

Perfektaj venkintoj (15 venkoj):
304 el 345 (88,11%)

Kvanto de legitaj paĝoj: Entute 19 079 paĝoj (345 homoj), averaĝe por unu homo 55,30 paĝoj. Partoprenantoj legas pli ol la promesitaj paĝoj, do ni povas diri, ke dum tiu ĉi sumoo ni legis entute pli ol 20000 paĝoj (57,97 paĝoj por unu homo)

Por tiu ĉi sumoo laboris entute **18 prizorgantoj**

Ĉefprizorganto: **Hori Jasuo**
(Japanio)

UEA



N-ro 901 (2020-08-17)
UN 75-jara: kien nun? Invito al plua diskutado kaj kunplanado en

MondaFest' 2020

(Kun afabla peto diskonigi tiun inviton inter viaj rondoj kaj kontaktoj, kiuj interesiĝas pri UN.)
[...]

N-ro 900 (2020-08-10)

IKU-libro 2020: rekorde elŝutita
Dum la Virtuala Kongreso de Esperanto la unuan fojon IKU-libro estis elŝutebla senpage jam dum la monda kongreso de UEA. [...]

N-ro 899 (2020-08-09)

14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la Virtuala Kongreso de Esperanto

En la Solena Fermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto estis anoncigitaj la nomoj de la 14 ricevantoj de la Diplomoj 2020 pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. [...]

N-ro 898 (2020-08-08)

Zlatko TIŠLJAR: nova Honora membro de UEA

Dum sia unua reta kunsido kadre de la Virtuala Kongreso la Komitato de UEA elektis Zlatko TIŠLJAR kiel Honoran Membron.
[...]

N-ro 897 (2020-08-08)

Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA

En la unua kunsido de la Ĝenerala Kunveno 2020 de la Komitato de UEA, kiu unuafoje en la historio okazis rete kiel parto de la Virtuala Kongreso de Esperanto, la Komitato elektis Humphrey Tonkin kiel Honoran Prezidanton de UEA. [...]

TEJO



Partoprenu studsesion en Budapeŝto pri seksismo

Nova limdato por kandidatiĝi: 23-a de aŭgusto

X-lingvo: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado
Studsiesio, 21-25 septembro 2020, Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KoE) kaj la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto (EYCB) organizas la studsesion "X Lingvo: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado". [...]

Partoprenu kurson pri homaj rajtoj en Slovenio

Centro de Edukistoj pri Homaj Rajtoj: estu aktoro de ŝanĝo!
COMPASS HRE NTK 2020 en Slovenio
La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj la Slovena Nacia Junulara Konsilio (MSS) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo organizas la projekton "Centro de Edukistoj pri Homaj Rajtoj: estu aktoro de ŝanĝo!". La projekto trejnos 18 junulojn, junajn estrojn, universitatajn studentojn, homajrajtajn aktivulojn kaj NFE-trejnistojn, kiuj loĝas ĉefe en Slovenio (aŭ alternative ĝiaj najbaraj landoj, [...])

Momentoj de IJK 2020 en la reto

Jen kio okazis dum la unua reta IJK 2020!
La sukceso de la 76-a Internacia Junulara Kongreso estas pro ĉiuj organizantoj, kontribuantoj kaj partoprenantoj, kiuj kune kreis unikan etoson. Dankon al ĉiuj!
[...]



Leteroj de niaj legantoj



Mi jam atendis la ĉiam akurate aperigitan "la Gazeto".
Turka Stelon.
Dankon!
Lenke Szász el Rumanio



Karaj amikoj,
Dankon por la n-ro 56 de "Turka Stelo" revuo kun ties vera bonstilo. Mi ĝoje legadas ĝin.

Tibor Szabadi el Hungario



Estimata sinjoro, mi sendas al vi por Turka Stelo plian mian trakonton. Mi volonte legas TS'n kaj trovas ĝin belaspekta kaj interesa. Sukceson al vi. Amike via,

Laimundas Abromas el Litovio



Estimataj,
Amike mi dankas al vi pro la ĝentila via akcepto publikigi mian rakonteton en la vere interesa "Turka Stelo". Legante ĝin mi okulumas estimon kaj ĝojon. Se la reeĥoj de Rekviemtago estos bonakcepteblaj mi kontentos.

Plej amikaj salutojn!

Petar Todorov el Bulgario



En la aŭgusta numero de Turka Stelo mi vidis tradukon de novelo de Ray Bradbury. Mi mem iam esperantigis unu novelon. "La promenulo", publikigita en la pereinta revuo

"la Gazeto".

Mi tre ŝatas liajn "Marsaj kronikaĵoj". La lecionoj en ĝi, pri usona imperiismo, la homaj momentoj pri amo kaj morto, kaj soleco, lia sens- kaj kor-plena maniero priskribi kaj sentigi la ĉiutagan vivon en Usono dum la 30aj jaroj. Sed la libro, kiu plej tuŝis kaj pensigis min estas lia romano, kiel nomi ĝin? la originale angla titolo "Something wicked this way comes", publikigita france sub la titolo "La foire des ténèbres" (La foiro de tenebroj). Eble ĝi aperis en Turkujo sub ankoraŭ alia titolo, do kiel nomi ĝin Esperante!

Mi plu legis "Turkan Stelon" kaj trovis la artikolon de Marcel Leereveld. Tre interesa historie! kaj pensigas pri la vojaĝo 3 jarojn antaŭe de juna Frislandano (do ankaŭ Nederlandano) Sipke Stuit, mi esperantigis unu ĉapitron de la angla versio (la origina konjekteble aperis en la frisa lingvo), kaj ĝi aperis en Sennacieca Revuo.

La anekdoto pro ebriĝo pensigis al mi pri unu el la tre raraj memoraĵoj, kiujn mi ricevis de mia nun forpasinta onklo Gérard, li estis farinta (sola de la familio) altajn studojn en inĝeniera-lernejo en Parizo. Li rakontis, ke vespere li iradis trinki (fakte drinki!) en la centron de Parizo, poste li reiradis al sia studenta ĉambro sur sia biciklo, sed ĉar li estis ebria, la biciklo zigzagis tra la ŝoseo! Feliĉe, li aldonis, en tiu epoko (1947) estis tre malmulte da veturiloj en la nokto sur la stratoj de Parizo, do ne estis danĝere!

Roland Platteau el Francio

TEMPO SIGELITA


I GIRASOLI - LA SUNFLOROJ (1970)

Foje mi lamentas kaj kompatas iujn aktorojn. Jen pro kio: Ili restas malantaŭ la nomoj de la mondfamaj aktoroj. Oni ne memoras ilin, aŭ oni ignoras ilin eĉ kiam la filmo estas en kinejoj. Ŝajne okazis tiel ankaŭ por Lyudmila Savelyeva, kiu estis fama aktorino en sia lando tiutempe. Ŝi restis en la ombro de la mondfamuloj: Sophia Loren kaj Marcello Mastroianni. Mi nur diras tion en la kunteksto de famo. Alie ŝi vere



verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkio

estis bona aktorino. La balet-devena Savelyeva pruvis sin en la 8-hora filmo "Milito kaj Paco", kiun adaptis la rusa fama direktoro Sergei Bondarchuk, kiam ŝi ankoraŭ estis 24-jaraĝa. Mi ne scias, kiel malkovris ŝin Vittorio de Sica, sed li faris bone. Kiam la filmo "Milito kaj Paco" estis nomumita al la Plejbone Eksterlanda Filmo-Oskaro en 1969, ĉi tiu mildvizaĝa, timema kaj bluokula, tipe rusa aktorino, estis sendita al Holivudo de la sovetia ŝtato, kaj tiel ŝi fariĝis ankaŭ konata en eŭropaj kaj amerikaj rondo. Eble la direktoro kaj produktanto rekonis ŝin pro ĉi tiu filmo. Ie! Sed tamen ŝi havis mallongan rolon en ĉi tiu filmo: "I Girasoli". Savelyeva, kiu rolis kiel la rusa edzino de Antonio, pere de ŝiaj okuloj reflektas ĉiun emocijon perfekte, samkiel Sophia Loren. En ĉi tiu filmo, Vittorio de Sica, kune kun kinematografiisto Giuseppe Rotunno, uzis tre lerte la vizaĝojn de la aktoroj. Kiel Ingmar Bergman. Jes, la



aktoroj bonas, sed kino estas la arto sigeli tiujn vizaĝojn, sur la filmo-kvadratojn. Kaj tion faras la direktoro, la kinematografiisto kaj eĉ la filmredaktisto. Mi precipe ŝatis la du inajn ĉefrolulojn en ĉi tiu filmo. Sed ĉiuj rolis tre bone, eĉ la plej malgranda rolulo.

"I Girasoli" ne estas speco de "arta" filmo, kiun festivalaj spektantoj admiras. Ĝi estas emocia, komforte spektata sed tamen majstra filmo, kiu plaĉas ankaŭ al la averaĝa spektantaro. Carlo Ponti, la produktanto kaj la edzo de Sophia Loren, estas unu el la elstaraj posedantoj de la sukceso de la filmo, same ankaŭ la du grandaj scenariistoj de la historio de kino: Cesare Zavattini kaj Tonino Guerra. La aŭtoro, pri kiu Andre Bazin diras, "Zavattini sole estas ĉio, sed Vittorio de Sica estas nenio sen Zavattini", estas la fondinto kaj teoriisto de Nova Realismo. Tonino Guerra, la scenariisto de famaj filmoj kiel "Amarcord" kaj "Blow Up", estas iu alia majstro.



Mi ne povas fari maljustaĵon al la direktoro Vittorio de Sica. Li estas aktoro kaj direktoro, kiu lasis sian stampon en la Itala Teatro kaj Kino de la malfruaj 1920-aj jaroj ĝis la 70-aj jaroj. "Hieraŭ, Hodiaŭ, Morgaŭ", "Itala Geedziĝo", "Biciklo-Ŝtelistoj" kaj "Umberto D." estas iuj el liaj bone konataj filmoj. Kion ni povas diri pri Sophia kaj Marcello? Ili estas la neforgeseblaj vizaĝoj ne nur de la itala sed ankaŭ de la monda kinoarto. Ili estas du kino-dioj, kiuj enamigis nin al "italecon", kaj kiuj igis nin sperti la malriĉecon kaj dolorojn de la postmilitaj jaroj!



MALLONGE

- En kino ne gravas la vorto mem, sed la sinteno kaj gesto, per kiu oni diras tiun vorton. En ĉi tiu filmo estas simplaj vortoj sed ankaŭ majstraj aktoroj, kiuj reflektas la emociojn amasiĝantajn sub tiuj vortoj.

- Estas du paroj da estetikaj okuloj, kiuj sigelas la majstrajn aktorojn en la filmokvadratoj: la okuloj de la reĝisoro kaj la kinematografiisto.

- Scenario estas feĉo. Kaj bona pano estas farita el bona feĉo.

- En unu sceno de la filmo, oni kondukas Giovanna-n, kiu serĉas sian edzon en Rusujo, al la sunfloro-kampo. En ĉi tiu sceno, la lokaj kamparaninoj priskribas tion: "Ĉi tie kuŝas italaj soldatoj kaj rusaj civiluloj. La germanoj fosigis al ili iliajn proprajn tombojn. Ĉiu sunfloro, ĉiu arbo, ĉiu greno-kampo; kovras la kadavrojn de italaj, rusaj kaj germanaj soldatoj. Ankaŭ la kadavrojn de la rusaj kamparanoj, rusaj virinoj, gemaljunuloj kaj infanoj." La filmo prenas sian titolon el la sunfloroj, kiuj kreskas en ĉi tiuj teroj, kie mortfalis tiuj homoj pro la milito.

- Milito ne ĉiam signifas venk-heroojn, kiuj revenas hejmen. Ĝi ankaŭ signifas perditajn homojn, vunditojn, dissiĝintajn familiojn, geamantojn kiuj ne povis kunveni, perfidojn kaj senesperajn geedziĝojn.

- Sophia Loren estas belulino.

- La filmo, kiu malfermiĝas per sunfloroj, fermiĝas kun malĝoja ĝeno parolado en domo, kie elektro mankas, sub malvarma, griza vetero. Lumo kontraŭ mallumo.

- La dramo de tri virinoj. Nek la patrino, nek Giovanna, nek Mascia feliĉas. Estas "mankanta" viro por ĉiu de ili. Komuna punkto : Antonio.

- La itala viro, kiu kaŝas sian identecon kaj poste konfesas ĝin, tute ne estus bezonata en la filmo. La sola kialo, ke li estis enmetita en la scenarion estas por apogi la penson de Sofia kiu serĉas sian edzon en Rusio: "Se italo, kiu postvivis la militon, loĝas en Rusujo kun alispeca identeco, tio signifas, ke ankaŭ ŝia edzo plej eble estas vivanta ĉi tie."

- Interplektado de humuro kaj ridigo. De Sica, kiu komencis sian artan vivon kun komedioj, miksis iom da humuro en ĉi tiun malgajan filmon.

- La obstino kaj pasio kaj detruo de la amanta virino.

- Sinofero de iu alia virino, ŝia amo, ŝanceliĝo

- Antonio ne perfidis. Li restis elĉerpita sur la neĝa tereno de lando, kiu distancas je mejloj kaj kulturo. Humanista virino savis lin, sendepende de lia nacieco... Post lia perdo de memoro, li revenis al la vivo kun la subteno de Mascia.

- Imiti frenezulon ne malhelpas esti sendita al la militfronto. Faŝismo ankaŭ kontroladas en mens-

>>16

Travagante la vere ravan helenan mitologion ni renkontas impresajn historiojn, kiuj prezentas ĉiajn aspektojn de la homa ecaro, de la plej bona ĝis la plej malbona versio de la homa povo kaj faro. Vidante la aferojn el la vidpunkto de la vasta ideo pri la moralo konstruita en la nekalkulebla daŭro de la homa evoluo, ni miras, kiam ni atingas historiojn, en kiuj interplektiĝas la instinkto kaj la plej ekstremaj pasioj kaj perversioj. Kelkaj aferoj ŝajnas al ni tute ekstremancaj, tamen, kiam ni fortiras la vualojn de la fantaziaj, supernaturaj troigoj, fine ni konstatas nur tion, ke la homoj de la mitoj kaj legendoj elpensitaj antaŭ multaj jarmiloj estas tute similaj al la nuntempaj homoj; la sola krepova estaĵo de la naturo estas ĉiam kapabla, laŭ la cirkonstancoj, fari la plej superan bonon aŭ la plej ekstreman malbonon.

Mi opiniis necesa tiun ĉi prologon, ĉar tiu ĉi rakontado plejparte estas dediĉita al la plej fatala ina figuro de ĉiuj epokoj. Tamen, por atingi nian heroinon, ni devas ekiri el pli antaŭa epoko kaj el malproksima al ŝi loko.



Reĝo de Orĥomeno (Ορχομενός), civito de la helena lando nomata Beotujo (Βοιωτία), estis iu Atamaso (Αθάμας). Tiu reĝo estis edziĝinta kun duondiino nomata Nefela (Νεφέλη), el kiu li estis akirinta du infanojn, filon nomatan Frikso kaj filinon nomatan Hela. La reĝo havis ĉion kion homo povas deziri, li devus esti kontenta, sed, kiel ofte okazas, iam li ekkonis kaj ekamis Inoan (Ινώ), la belan filinon de Kadmo (Κάδμος), granda suvereno, fondinto de la glora Tebo (Θήβαι). Ni diris ke Atamaso estis reĝo, do, kiel ĉiam povas fari la reĝoj kaj la ceteraj absolutaj regnestroj, li forpelis sian edzinon kaj edziĝis kun Inoa. Kompreneble, li tenis ĉe si siajn infanojn, sed tio tute ne plaĉis al la nova edzino, virino akre malmilda, kiu malamis la infanojn kaj deziris pereigi ilin. La

tempo pasis, Frikso estis jam junulo, Inoa ne povis moderigi sian malamon, sed ŝi ne povis efektiviĝi siajn krimajn planojn. Tamen, iam, terura inancio trafis la landon. La reĝo, en stato de profunda malespero, sin turnis al la dioj, do, li decidis sendi kelkajn siajn homojn al la divenejo de Apolono (Απόλλων), en Delfoj (Δελφοί), por peti orakolon. Inoa kaptis la okazon, ŝi subaĉetis la reĝajn senditojn, kiuj, laŭ ŝiaj indikoj ŝajnis ke ili iris al la divenejo kaj revenis kun terura dia orakolo, kiu ordonis la reĝon sanktoferi al la dioj siajn proprajn infanojn, por savi sian regnon de totala pereco. Kompreneble, Atamaso hezitis, li ne povis fari tian krimon, tamen la suferanta popolo kaj lia edzino postulis, ke li obeu al la dia admono, do, fine, li estis konvinkita. Kompreneble, neniu pensis tiam pri la forpelita kaj forgesita patrino de la infanoj, Nefela, kiu, tamen, de malproksime atentis siajn infanojn, estante ĉiam preta protekti ilin. Kiam, do, ŝi konsciis kia terura danĝero minacas ŝiajn infanojn, ŝi aliris al siaj plej



proksimaj dioj, ŝi petegis pri helpo kaj Hermeso (Ερμής), la bonkora dio, protektanto interalie de la vojaĝantoj, donacis al ŝi miraklan, grand-korpan, flugpovan virŝafon, kiu havis oran felon. Tiel, kiam ĉio sur la oferaltaro estis preta, kiam la responda pastro estis preta buĉi la gefratojn, la granda besto malsuprenirinte el la ĉielo kaj kaŭzante miregon, tumulton kaj timegon, ekstaris sur la altaro. Tiam, Frikso kaj Hela ekrajdis sur ĝin kaj ĝi supren-flugis, ĝi malaperis. La mirakla ŝafo trafugis grandan distancon, preskaŭ la tutan helenan landon, ĝi direktiĝis norden, poste orienten, ĉio iris glate, la junaj gefratoj

estis sekuraj kaj kontentaj, tamen, kiam la ŝafo transflugadis la markolon inter la traka duoninsulo kaj Malgrandazio, Hela, ĉu ĉar ŝi laciĝis, ĉu ĉar ŝi ekdormis, perdis la ekvilibron, ŝi falis en la maron, ŝi malaperis! Ekde tiam, tiu markolo ricevis la nomon Helesponto (Ελλάσποντος), el la nomo de la malbonsorta Hela kaj la vorto "πόντος" (pontos), kiu signifas "maro". Frikso daŭrigis sian flugvojaĝon, ĝis kiam la mirakla virŝafo malsupren-flugis al Kolĉido (Κολχίς), lando ĉe la Nigra Maro, sude de Kaŭkazo. Frikso estis savita de la dioj kiuj favoris lin per sia protekto, do, tuj kiam li pied-staris sur la tero, li preĝe sin turnis al ili kaj tuj poste li sanktoferis la disenditan orfelan virŝafon al Zeŭso.

Reĝo de Kolĉido estis Ajeto (Αιήτης), suvereno

prudenta, sed, konforme al la lokaj kutimoj, tre severa, preskaŭ sovaĝa. Malgraŭ tio, Frikso aliris al tiu reĝo, li rakontis al li ĉion, li petis pri protektado kaj li donacis al li la ununuran en la tuta mondo oran ŝaf-felon. Ajeto volonte akceptis ĉe si la noblan junulon kaj ties unikan, multekostan donacon, kiun li metis en sankta parko dediĉita al la dio de la milito Areso (Άρης), loko malpermeita al ĉiuj homoj, gardata tagnokte de multaj sendormaj, sovaĝaj armitoj kaj, precipe, de grandega serpent-forma monstro, vera drako. En Kolĉido Frikso gajnis la simpatian kaj favoron de la reĝo, li edziĝis kun ties filino Ĥalkiopa (Χαλκίωπη) kaj vivis feliĉe ĝis la profunda maljuneco.



La informo pri la estado de tiu ora felo rapide disvastiĝis en la tuta Helenujo, vekis la intereson de multaj aventuremaj viroj, unu el kiuj estis Jazono. Tiu Jazono estis filo de la reĝo de Iolko (Ιωλκός), regno de Tesalio (Θεσσαλία), ĉe la piedoj de la monto Peliono (Πήλιον). Kiam Jazono estis infano, la trono de lia patro estis perforte uzurpita de lia onklo, nomata Pelio (Πελίας), homo tre malbonkora, severa, senindulga. Por savi lin, la patro de Jazono ŝtele sendis lin malproksimen, sur la monton, ĉe la konata, saĝa centaŭro Kirono (Χείρων). Jazono restis ĉe la fama en la tuta tiama mondo edukisto de la plej gloraj helenaj herooj. Li lernis multon kaj kiam li viriĝis li decidis depostuli sian reĝrajton, do, li ekiris direkte al Iolko, preta alfronti la uzurpinton de la trono. Ni diru, ke tiu lasta, reganto tre severa kaj maljusta, estis simpatia nek al la civitanoj, nek al la dioj mem, kiuj favorus eventualan ties detronigon. Por provi Jazonon, la diino Hera (Ήρα), preninte sur sin formon de kompatinda, senpova maljunulino, sidis ĉe la bordo de larĝa, tre aspra, malglata, ne facile transirebla rojo. Kiam Jazono alproksimiĝis, la maljunulino komencis plori kaj vei, ĉar ŝi ne povis transpasi la rivereton por

atingi la vilaĝon de siaj genepoj. La bonkora Jazono senhezite haltis, li levis la maljunulinon sur sian dorson kaj kun tre granda malfacileco, penege, li transpasis ŝin. Tiele li gajnis la favoron de la dioj, sed en la koto de la rojo li perdis unu sian sandalon. Mi notas tion, ĉar antaŭ iom da tempo, estis donita al la reĝo Pelio orakolo, laŭ kiu, nekonata al li unusandala viro, forprenos de li la kronon. Jazono atingis la urbon en tago de publika festo, kiun partoprenis ankaŭ la reĝo mem. Nia heroo tute ne hezitis, kun granda kuraĝo, en la ĉeesto de multaj homoj, staris antaŭ Pelio, fiere li sin prezentis kaj deklaris sian postulon pri la trono de sia patro. Pelio estis preta ridi, tamen li ekrimarkis, ke la fremdulo portas nur unu sandalon; li ekmemoris la orakolon, li maltrankviliĝis kaj li decidis trakti la aferon ruze. Li ŝajnis ke li konsentas kun sia nevo, ke li estas preta volonte liveri al li la tronon, sed li postulas de li, ke li prenu sur sin la taskon plenumi gravan mision, por utili la landon kaj montri al la popolo, ke li meritas la regadon. La misio estis ne plenumebla, ĉar ĝi celis la konkeron kaj alporton de la multe flanke plej valora kaj plej dezirata en la tuta mondo akiraĵo, de la gardata en la malproksima Kolĉido ora ŝaf-felo. Pelio sciis, ke sukceso de tia misio estas neatingebla, tamen la propono estis farita en la ĉeesto de la popolo, Jazono ne povis eviti la provokon kaj, vere, la junulo senproteste akceptis la kondiĉon kaj tuj komencis la preparadon. Li bone sciis, ke tiu ekspedicio, postulanta superhoman kuraĝon kaj neordinaran heroecon, altirus la atenton kaj intereson de la plej grandaj helenaj herooj kaj lertaj militistoj. Do, li sendis heroldojn al ĉiuj konataj tiaj personoj en la tuta Helenujo kaj, kiel li supozis, la plej granda parto de la tuta helena forto, kvindek gloraj herooj entute, akceptis lian proponon kaj komencis la preparadon por sia partopreno en la granda, esplora kaj milita entrepreno. Tuj estis komencita, eĉ sub la egido de la diino Atena (Αθηνά) mem, kiel oni diradis, la konstruado de Arĝoo (Αργώ), de la granda, 50remila ŝipo, farita el rara ligno de Peliono, tre dura, imuna preskaŭ kontraŭ ĉio, eĉ nebruligebla, sed tre malpeza. La mirakla, tre fortika sed tre malpeza kaj rapida ŝipo ricevis sian nomon, ĉu ĉar la ĉefa ŝipkonstruisto estis nomata Arĝo (Αργος), ĉu ĉar simple la helena vorto “αργός” (argos) signifas “rapida” kaj “brila”. Tiel la 50 grandaj herooj ricevinte la, por eterne konata, alnomo Argonaŭtoj (Αργοναῦται), ekiris sub la komando de Jazono. Estis unu el la plej gravaj, gloraj, longaj, aventur-plenaj helenaj militekspedicioj de la praa mita epoko, kies la pritraktado kaj priskribado postulas plenan mult-paĝan libron. Mi, do, preterpasas la longan, plenan je nepriskribeblaj aventuroj, bataloj, kaj

brilaj heroaĵoj, ŝpiradon de la Argonaŭtoj kaj ni renkontas ilin en ilia fina celo, en Kolĉido.

Kiel mi jam diris, reĝo de Kolĉido estis Ajeto, kiu havis la famon de negastama, al ĉiuj malamika, eĉ kruela kaj sovaĝinstinkta tirano. Estas tamen vere, ke post la akiro de la ora ŝaf-felo estis multaj la malamikoj kiuj deziris eĉ planis invadon kaj konkeron de lia lando, krome, la reĝo estis ricevinta orakolon de sanktejo, laŭ kiu lia lando restus sendependa kaj potenca tiel longe, kiam la ora ŝaf-felo estus en ĝi. Pro tio Ajeto estis deklarinta, ke neniu fremdulo estos akceptata en la lando, kaj ĉiu kiu aŭdacos eniĝi en ĝi sen permeso, estos nepre mortigita. Tiu Ajeto havis du filinojn, Ĥalkiopan, tiun kiu iĝis edzino de Frikso, kaj la multe pli junan Medean. Tiu Medea estis pastrino de la triaspekta Hekata (Εκάτη), la diino reganta la malbonagajn, malicajn spiritojn, kaj protektanta la sorĉistojn, venenistojn kaj ĉiujn servantojn de la obskura mondo. Tiel, Medea estis virino neordinara, naturo senbrida, flamema, furioza, ekstreme pasia. Ŝi estis plej lerta sorĉistino, ŝi sciis ĉiujn venenojn kaj ĉiujn bonefikajn kaj malbonefikajn drogojn, herbojn, sukajn, ĝustedirate, ŝi estis virino danĝera, vere veneneca. Jazono, kiu estis informita pri la malpermeso de Ajeto, preferis ne tuj montri al li malamikan intencon, do, Argoa alboridiĝis malproksime de la urbo kaj li, akompanata de nur du kunuloj, helpe de unu el la filoj de Frikso, sukcesis sen problemoj atingi la palacon kaj sin prezenti al la reĝo. Li rekte petis la oran felon, li rakontis al li kio okazis, kial li nepre bezonas la felon, kaj li klarigis, ke li povos ĝin preni post batalo, kiun tamen li preferas eviti. Sed, ankaŭ Ajeto ne deziris militi kontraŭ la Helenoj kies famo estis antaŭ longe atinginta lin, do, li ŝajnigis, ke li liveros la felon, tamen, kiel rekompenco, li petis de Jazono, konata en la tuta mondo heroo, liberigi lin kaj lian landon de granda malfeliĉaĵo. Ankoraŭfoje Jazono devis sin elmeti al tre danĝera elprovo, postulata superhoman forton kaj kuraĝon. Tamen, la temerara heroo pensis ke estas justa la postulo de Ajeto, do, ne longe pripensinte la aferon li akceptis la kondiĉon. La tasko estis tre malfacila kaj danĝera; en la sankta parko de Kolĉido estis du teruraj, tre grandaj, sovaĝaj taŭroj, kiuj havis flamantan elsiron kaj kuprajn ungojn. Tiujn, do, terurajn bestiojn Jazono devis alfronti, dresi, obeigi kaj jugi.

Dume, Medea, kiu nur unufoje, de malproksime vidis la fremdan junulon, fulme, mirakle sentis fortan, senbridan ekamon. Tio okazis, ĉar Hera, la diino kiu konstante protektadis Jazonon, bezonante la helpon de Medea petis de Afrodita (Αφροδίτη), la diino de la amo, ke ŝi inspiru al la sorĉistino fortan, pasian amon. La diino faris tion en sonĝo de Medea, do, la

antaŭtagon de la batalo kontraŭ la monstroj, la malmodera, varmegsanga virino, ne perdis tempon, en la mezo de la nokto ŝi enŝteliĝis en la ĉambron de Jazono, senhezite kaj kuraĝe ŝi konfesis al li sian pasian amon, ŝi certigis lin, ke sen ŝia helpo li ne povos venki la bestegojn kaj tute certe li neniam akiros la felon, ĉar la monstra gardisto, estaĵo neimageble terura, granda kiel tuta ŝipo, havas forton de mil viroj. Ŝi, do, oferis sian helpon, per kiu la konkero de la felo estas certa, tamen, ŝi metis al li la kondiĉon, ke kiam li akiros tion kion tiom multe deziras, li edziĝos kun ŝi kaj li prenos ŝin en sia patrujo. Ŝi promesis, ke ŝi estos ĉiam amema, tenera, fidela edzino, ke per siaj supernaturaj fortoj ŝi ĉiam protektos kaj helpos lin efektiviĝi ĉion kion li celas. Jazono estis forte impresita de la flamanta temperamento de Medea, sed ankaŭ de ŝia neordinara beleco, do, tiu lia granda miro kaj kune lia ambicio gvidis lin akcepti la proponon de la bela junulino. Medea tuj preparis ŝmiraĵon el konataj al ŝi herboj kaj sekretaj substancoj, per kiu Jazono ŝmiris sian korpon kaj siajn armilojn. Poste, laŭ la indikoj de Medea, laŭtvoĉe li elvokis Hekatan kaj iris renkonte al la bestioj, kies la flamoj kaj la teruraj ungoj ne povis lin vundi. Do, li sukcesis venki, dresi kaj jugi la taŭrojn. Post tio, Ajeto komencis kolekti armeon por subite, neatendite ataki kaj pereigi Jazonon kaj la Argonaŭtojn, tamen, Medea ĝustatempe sciigis sian amanton, ŝi kondukis lin en la sanktan parkon, en kiu ŝi eniris sola, ŝi senriske alproksimiĝis al la monstra drako kaj verŝis gutojn da ia sorĉaĵo en ĝiajn okulojn. La monstro tuj falis en profundan dormon kaj tiam la Argonaŭtoj eniĝis, mortigis ĉiujn gardistojn, ili prenis la oran felon, ili enŝipiĝis kaj rapide foriris. Kompreneble, Medea iris kun sia amanto, eĉ preninte kun ŝi la plej junan filon de Ajeto. Tiu lasta, tuj mobilizis sian floton kaj komencis la persekutadon de la rifuĝintoj. Por malfruiĝi la persekutantojn, la senlime severa Medea ne hezitis ĵeti en la maron, sian fraton. La Argonaŭtoj fine sukcesis fuĝi kaj ili daŭrigis sian navigadon, kiu estis plena je malfacilaĵoj, aventuroj, bataloj, sukcesoj kaj venkoj, kelkajn el kiuj ili atingis helpe de Medea. En la daŭro de la aventur-plena revenado, Jazono, fidela al sia promeso, edziĝis kun Medea, kiun post nelonge amis multe.

Mi lasas la epizodojn de la navigado, tiel ni renkontas niajn heroojn en Iolko. Argoa alboridiĝis al dezerta, distanca de la urbo loko kaj tie, spionoj alportis la informon, ke Pelio estas decidinta ne liveri la tronon kaj pro tio li estis jam mortiginta la patron, la fraton kaj ĉiujn familianojn de Jazono. Estis kolero, estis indigno, estis ankaŭ konfuzo kaj embaraso, ĉar Pelio posedis tre multenombrian milit-pretan armeon. Kelkaj Argonaŭtoj subtenis la ideon pri tuja atako, aliaj

opiniis, ke ili devas venigi kromajn militistojn el siaj patrujoj, tamen, Medea petis kaj Jazono permesis al ŝi trovi la solvon. Uzante siajn sorĉajn ŝmiraĵojn ŝi aliformiĝis, ŝi prenis sur sin formon de maljunulino kaj ŝajnigante sin pastrino de la diino Artemisa (Αρτεμις), tenante iun ties idolon ŝi iris al la palaco, ŝi prezentiĝis al la reĝo kaj diris, ke ŝi alportas al li donacon el la sanktejo de la foraj Hiperboreoj (Υπερβόριοι). Ŝi estis konvinka, Pelio kaj lia familio bonakceptis la fremdan pastrinon, kiu en la daŭro de diskutado diris al la filinoj de la reĝo, ke ŝi scias la manieron, iun sekretan procedon, per kiu ĉiuj vivaj estaĵoj povas iĝi denove junaj. Por pruvi tion, ŝi petis ke oni lasu sin sola kaj tiam tre facile ŝi senmaskiĝis kaj ŝi prezentiĝis en sia reala, freŝe juna formo. La junulinoj forte impresiĝis kaj diris al ŝi, ke tio estas la granda deziro de ilia patro, iĝi denove juna. Medea diris ke tio estas tute simpla kaj petis ke oni alportu, buĉu kaj dispecigu maljunan kapron kaj metu ĝin en kaldronon. Poste, ŝi sutis kelkajn siajn polvojn en la bolaĵon kaj petis ke oni atendu la rezulton. Poste, tre facile ŝi hipnotigis la atendantajn regidinojn, ŝi malaperigis la bolintan viandon kaj ŝi lasis libera en la kuirejo vivan kapridon. Kiam la reĝidinoj rekonsciiĝis, impresiĝis ankoraŭ pli multe kaj Medea konvinkis ilin surprizi sian patron kaj helpi lin iĝi denove juna. La naivaj junulinoj obeis, ili mortigis, dispecigis kaj boligis sian patron, tamen tiam Medea malaperis. La Argonaŭtoj, ricevinte signalon de Medea, pri la morto de Pelio, atakis la urbon kaj facile ĝin konkeris. Tamen, malgraŭ ke la popolo ne amis Pelion, la disvastigo de la novaĵo pri la horora krimo, atribuita al Jazono, igis lin antipatia. Tiel, Jazono, kontentiĝinte per sia venĝo, lasis la tronon al la filo de Pelio Akasto (Άκαστος) kaj iris al Korinto (Κόρινθος). Tie, li oferis Argoan al la granda sanktejo de Pozidono (Ποσειδών) kaj kun sia edzino kaj iliaj du infanoj enloĝiĝis en la palaco de la reĝo Kreono (Κρέων). La geedza paro sufiĉe longe vivis tie feliĉe, tamen, iam Jazono enamiĝis al la filino de Kreono Glaŭka (Γλαŭκη) kaj decidis forlasi Medean kaj edziĝi kun ŝi. Vane Medea klopodis ŝanĝi lian maljustan decidon, vane ŝi memorigis al li iliajn ĵurojn, Jazono ordonis ŝin foriri. Hazarde, en Korinto estis tiam nobla vizitanto, la reĝo de Ateno (Αθήνα), Egeo (Αιγεύς), kiu oferis gastigadon al la bela virino. Medea, ŝajnigante ke ŝi finfine obeas al la decido de Jazono komencis la preparadon de sia foriro. La antaŭtagon li sendis al Glaŭka, kiel nuptan donacon, oran kronon kaj treege belan silkan robon. Glaŭka tre agrable akceptis la multekostan donacon, kaj tuj deziris prove ĝin surporti. La robo estis tre bela, tamen, post kelkaj momentoj, flamoj kovris la tutan korpon de la malfeliĉa virino, kiu eligis terurajn ekkriojn. Ŝia patro alkuris por

ŝin helpi, sed ankaŭ li kovriĝis per flamoj, patro kaj filino turmente mortis. Tiu teruraĵo ne sufiĉis al la duon-freneza Medea, kiu deziris ankoraŭ pli multe suferigi, dolorigi, eksterm-venĝi la malfidelan edzon. Ŝi faris la neimageblan, la neakcepteblan eĉ por la plej perversa cerbo murdo, ŝi mortigis siajn proprajn infanojn!



Farinte tion, Medea gajnis la eternan famon de la plej ekstrema kaj malaminda krimfaristo kaj ŝia nomo estas donata ĝis nun al la, feliĉe tre malmultaj, virinoj, kiuj faras la saman krimregon.

Post ĉio tio ĉi, Medea iris al Ateno, ŝi edziniĝis kun la reĝo Egeo kaj naskis sian filon Medo (Μήδος). Kiam, post multjara foresto, revenis al Ateno la filo kaj kron-princo Tezeo (Θησεύς), Medea provis ankaŭ lin mortigi, sed tiun fojon ŝia plano fiaskis kaj Egeo forpelis ŝin. Ŝi iris kaj enloĝiĝis en Fenicio (Φοινίκη), kie, per ŝia helpo, ŝia filo prosperis, iĝis potenca suvereno kaj gentopatro de la Medoj. Kiam Medo falis en batalo, Medea revenis al sia patrujo Kolĉido, kie perdiĝas ŝiaj spuroj.

Pri la fino de Jazono estas duboj; kelkaj diradis ke li mortigis sin, aliaj ke li akcidente mortis en Korinto.

Estas kompreneble, ke el la dramo de tiu ĉi rakontado elvenis abundo da alt-nivelaj artaĵoj de ĉiaspecaj, grandaj art-kreintoj, de ĉiuj epokoj. Multaj tragediverkistoj, poetoj, pentristoj, skulptistoj, komponistoj, reĝisoroj, aktoroj, ĉiaj artistoj okupiĝis pri la afero, lasinte riĉan, tre valoran art-rikolton.

Pri Argoa la antikvuloj kredis ke la diino Atena lasis ĝin flosi sur la ĉielo. La vero estas, ke Argoa (Argo, Navis, Navire) estas unu el la malmultaj konstelacioj konataj ekde la profunda antikveco. Ĝi estas la plej granda konstelacio, en la suda hemisfero, kun multaj, brilaj kaj videblaj steloj, kiuj memorigas al ni la heroaĵojn de la brilaj Argonaŭtoj!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Nikolai Kurzens

Ĉu tio do – la vivo?

Kio estas liriko? La vorto devenas el la greka lingvo. Ĝi rilatas al liro, tipo de muzikilo, kaj iam signifis ankaŭ poemon, kiun oni kantis kun akompano de liro. El tio devenas la signifo “poezio esprimanta personajn pensojn kaj emociojn de la poeto”.

Liriko ne rakontas, ĝi esprimas privatajn sentojn, privatajn pensojn. Kiel atendeble, tiaj pensoj, tiaj sentoj, povas esti tiom variaj, kiom estas la poetoj mem. Ili povas esti gajaj kaj ĝojaj, sed ankaŭ malgajaj, malviglaj, ili povas esti optimismaj, sed ankaŭ pesimismaj.

La poeto, kiun mi nun prezentas al vi, verkis lirikajn poemojn de la dua speco. Liaj lirikaĵoj esprimas lian pesimisman, lian senesperon, liajn animajn suferojn. Sed tion li faras per senmakula arto, kiu donas al li lokon inter niaj plej bonaj poetoj.

Tiu poeto estas la latvo Nikolai Kurzens (Nikolajs Ķurzēns). Li naskiĝis en 1910 en la urbo Alūksne en norda Latvio. Li laboris kiel ŝtato-ficisto en Rigo, la ĉefurbo, kie li ankaŭ studis ekonomikon en universitato. Li lernis Esperanton kiel junulo kaj poste aktive partoprenis la Esperanto-agadon de Latvia Esperanto-Societo en Riga, fariĝis ĝia vicprezidanto kaj redaktoro de Esperanta revuo.

La militaj kaj postmilitaj jaroj estis por li malfacilaj, kaj li ne plu partoprenis la latvan Esperanto-movadon post ĝia renoviĝo en 1957. Li mortis en 1959.

En 1938 aperis lia sola poemaro Mia Spektro. La titolo malkovras la personan karakteron de liaj poemoj, kiuj montras sentojn kaj sintenojn devenantajn el unu sama fonto, simile al la diversaj koloroj, devenantaj el unu fonto de lumo. La diferenco estas, ke la sentara spektro de la poemoj de Kurzens havas sian fonton de melankolio, sed ne de hela lumo. Tio elektas por li temojn de senespero kaj deprimado. Sed tiujn temojn li sukcesas transformi en arton de disciplino, kie trafa elekto de vortoj kaj formoj kunagas kun la temoj por krei individuan voĉon de poeto:

*Dum juno ĉiu vojo nin invitas
kaj ĉiu floro ŝajnas sin proponi;*



*sur pint' plej alta ni aspiras troni,
eĉ pens' pri cedo morde nin incitas.*

*Sed tempo pasas. Jaroj preterglitas.
La spitan “ni” flankŝovas graso “oni”.
Ni lernas kompromisi kaj duoni,
pruntitajn pensojn servoprete citas.*

*Kaj iam nur, sub sprono alkohola
sin ŝiras el la cerb' ĥaose bola
kaj provas kapon levi pens' aŭdaca.*

*Sed vane ĝi alarmon gongi provas:
la korp' inerta sin jam plu ne movas –
ĝi estas laca, peze, morte laca . . .*

(Tempo pasas)

Sed malgraŭ la reganta malgaja tono en la poemoj de Kurzens oni povas ankaŭ konstati agnoskon de la neceso aktive kontraŭbatali la senesperon de la vivrutino:

*Ĉu estas inde – fuĝi timigite
dum bleka bruo de frakasa fero,
ŝteliĝi for, flankumi for evite
de l' vivo-ver'?*

*Ja kion helpas plendo kaj lamento,
ja kion – plor', sopiro kaj suspiro?
Ne kaŝu vin! Ekpaŝu kontraŭ vento
kaj estu vir'.*

(Ĉu estas inde?)

Sed pesimismo tamen karakterizas la poezion de Nikolai Kurzens. Oni povas diveni, ke li ofte suferis pro daŭra psika deprimado. Eĉ lia sinteno al la naturo estas plena de dubo, li ne povas akcepti senrezerve la alvenon de printempo kiel la plenumiĝon de liaj belaj esperoj:

*Ĉu vere verdas ree la bulvardo,
ĉu vere venis la printemp' denove?
Sen kred', sen viglo, lace kaj senpove
kaj kvazaŭ time palpas la rigardo:
Ĉu ver'?' Ĉu vere verdas la bulvardo?*

(Majo)

Sed ne lasu la pesimisman tonon de liaj poemoj fortimigi vin. Nikolai Kurzens estas antaŭ ĉio artisto de la vorto. Liaj poemoj estas mallongaj, neniuj vortoj troas, la esprimo estas rekta, trafa kaj neniam

ĉirkaŭvojas la temon. Li neniam celas artefaritan originalecon, li ĉiam esprimas sin sen ia ajn afekto. Ni kredas lin, kunsentas kun li kaj rekonas lian personon kvazaŭ nian intimulon. Tial liaj poemoj vivas kaj pluvidos kun ni.

de **Baldur Ragnarsson**


(Juna amiko, n-ro 98, 2001)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/kurzens.html>

Maljuna viro kaj liaj du filoj

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

one....
B Estis iam tre maljuna viro, kiu, antaŭsentante, ke li baldaŭ mortos pro sia malfortigita sano, kunvokis siajn du filojn ĉe sian mort-liton, kaj tiel li ekparolis: "miaj karaj, ne forpasos multe da tempo antaŭ ol mi transiros al pli bona vivo. La fortoj pli kaj pli mankas al mi. Sed, kiel vi scias, mi estas tre riĉa kaj kiam mi ne plu estos ĉi tie, ĉiuj miaj posedaĵoj iĝos viaj. Al ĉiu el vi mi lasas po unu domego, aldone, al ĉiu el vi mi ankaŭ transdonas grandan sumon da mono por trankvile vivadi bonstate ĝis via maljunaĝo. Nur mi havas unu lastan deziron: tre plaĉus al mi havi majestan funeralon, tial, mi flankenmetis 40.000 eŭrojn (kvardek mil), bonvolu uzi tiun apartan monon por aranĝi tion kaj pagi ties elspezojn.



Do, la postan tagon la du heredontuloj kune iris al la urba funebra entrepreno por organizi la aferon. "Estimataj sinjoroj" diris la sepultema entreprenestro, "per tiu monsumo ni pretigos grandiozan funeralon: celebros la meson la kardinalo mem en la urba katedralo. Ĉien ni metos orkideojn luksegajn, kaj ni luos orkestron je violonoj kaj kontrabasoj kaj flutoj kaj ĉia muzik-instrumento por ludi la plej kortuŝan muzikon dum la meso. La ĉerko estos el multekosta ebonligno marketrita per belegaj oraj mozaikoj. La funebbran ĉaron trenos dudek ĉevaloj blankaj kun plumtufoj, kaj la vestaĵo de la mortinto, el silko, estos preparita de la plej sperta tajloristo el nia urbo".

Tiam la du fratoj rigardis unu la alian, kaj tiel ili respondis: "Bone, sendube tiu estus memorinda funeralo. Tamen, vi scias, pli bone konsiderante la aferon, eble 40.000 eŭroj por funeralo estas tro multaj. Ni vivas en epoko de ekonomia krizo, kaj disipi tiom multe da mono estus malprudente. Do, kion ni povas organizi per 20.000 eŭroj?"

"Bone" diris la direktoro de la funebrejo, "20.000 eŭroj estas ĉiukaze granda monsumo, kaj ni same povas aranĝi belan funeralon. Kompreneble, eble ne la kardinalo, sed la episkopo celebros la meson. Anstataŭ orkideoj, ni metos tulipojn, la nombro da orkestraj muzikistoj estos duonigita, la ĉerko estos el malpli multekosta kaŝtano, kaj la ĉevaloj, kiujn ni jungos al la ĉaro, estos dek, anstataŭ dudek."

Denove la du avidaj kaj avaraj fratoj rigardis unu

al la alia, kaj tion diris: "Nu, ni pensu bone. Nia familio, finfine, estas humila, do kial ni devus arogante fanfaroni ĝuste tiutage? Nia patro ja ne estas iu reĝo, do kial ni devus enscenigi tian paradon de malmolesteco? Kion ni povas fari per 10.000 eŭroj?"

Resume, la diskutado pri la prezo longe daŭris, ĉiufoje la du fratoj proponis pli malaltan kvanton da mono, ĝis kiam ili ofertis nur 400 eŭrojn.

"Ĉu 400 eŭrojn?" iom malbonmaniere diris la direktoro, "Per tiu mono, kampara pastro recitos patronia-n en kampara preĝejo. Neniu floro. Nenia muziko. Nek ĉevaloj nek ĉaro. Vi du transportos la ĉerkon surŝultre. Kaj tiun ĉerkon ni konstruos per kvar lignaj tabuloj, kiujn ni serĉos inter la forĵetita rubo de iu lignisto."

Kiam la du fratoj revenis hejmen, ilia patro vokis ilin, kaj per febla voĉo li diris: "do, ĉu ĉio en ordo, por mia funeralo?"

"Jes jes, paĉjo, ni aranĝis ĉion. Ne plu zorgu pri tio"

"Kaj kiom da mono vi elspezos por mia funeralo?" plu demandis la baldaŭ mortonta patro.

"Ne gravas, ne gravas paĉjo, ripozu nun, ne laciĝu!"

"Kiom da mono!?"

La du fratoj, ne plu povis kaŝi la veron, kaj iom honte respondis: "400 eŭrojn"

La patro silentiĝis. Li arigis siajn lastajn fortojn kaj kolere diris: "do, enterigu min kun mia kapo ekster la grundo, tiel vi ŝparos eĉ la monon por la fotografiaĵo sur la tomboŝtono, vi putinidoj!"

KORNIKO KAJ VULPO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Multfoje oni diras kun logiko
Pri malutil' de flat' kaj tamen sen sukces',
Char flato al la kor' penetras per kares'.
Peceton da fromagh' ekhavis la Korniko.
Jen sur abio, sur la branch',
Korniko-nigrulin' intencis per la mangh'
Regali sin, sed dume shi meditis.
Hazarde ruza Vulp' proksime preterglitis;
Aromo de fromagh' impresas al la Vulp':
Alvenas arbon li kun vido de senkulp';
Ravita de vidajh' la Vulpo voston svingas,
Fromaghon en la bek' agrable li distingas
Kaj diras dolche li kun intermita spir':
"Ho, mia karulin'! Belega por admir'!
Mirindas via kol'! Okula bril' — juvelo!
Gracia estas vi, simila al fabelo!
Kaj kia plum-ornam'! Kaj kia charma bush'!
Kaj certe via voch' plenravas en kortush'!
Ekkantu, karulin'! Se majstrus vi, fratino,
Kantadon, kie vi belegas lau destino,



Vi estus en arbar' reghino!"
La kapo de Kornik' turnighis pro laudeg',
Pro ghojo en la bust' ekchesis tute spiro,
Kaj al ghentila vort' de vulpa flata diro
Ekgrakis la Kornik' kun malfermita bek',
Fromagho falis for, al Vulpo — bel-akiro.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjevič Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Ambasadoroj el Aleksandrio (Πρέσβεις απ' την Αλεξάνδρεια)

tradukis kaj sendis **Roland Platteau**
el Francio



"Πρέσβεις απ' την Αλεξάνδρεια",
poemo de greka poeto
Konstantinos Kavafis el
Aleksandrio, Egiptio (1863 – 1933)

*De jarcentoj ne estis vidataj
en Delfo tiom riĉajn oferdonojn
kiom tiuj de la du Ptolemoj, la du
reĝoj, la du konkurantaj fratoj. Sed
la pastroj, kiuj ilin ricevis, maltrankviliĝas. Sian tutan
sperton ili bezonegas por verki kun sagaco la al ili
petitan orakolon. Kiun inter la du fratoj preferindas
malkontentigi ? La pastroj kunsidas nokte kaj*

*sekrete, ili diskutas aferojn de l'Lagid-aj
familioj.*

*Sed reaperas la ambasadoroj. Ili
reiras Aleksandrion, ili diras; ili nur
adiaŭas kaj nenium plu oraklon petas.
La pastroj ĝojas, ili cetere la riĉajn
donacojn konservas. Sed tre scivoligitas, ne
kompreninte el kio venas tiu subita malinteresiĝo. Ili
Ignoras, ke hieraŭ seriozaj novaĵoj atingis la
ambasadorojn. Orakolo estis metita en Romo. La
disdono estis farata tie.*

tradukis kaj sendis **Roland Platteau**
el Francio



Esperanta Infanlibro de Julian Modest

"La aventuroj de Jombor kaj Miki" – infanlibro, originale verkita en Esperanto. Eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Đurđevac (Kroatio), 2020, grafike aranĝis Josip Pleadin, ilustris Ivana Pleskina, postparolo Blazio Wacha.


La libro allogas per la neordinaraj aventuroj de la knabo Jombor kaj la eta Miki, kiu estas dekcentimetra, tamen sperta fari miraklojn – flugi rapide, eniri nerimarkeble en domojn, vendejon, piratŝipojn, indianajn tendarojn.

Julian Modest bone konas la infanan pensmanieron, rakontas majstre, vekas la infanan

fantazion kaj montras la mirandan buntan mondon de la fabeloj. La libro instigas la etajn legantojn pensi, rezoni, fantazii. La legaĵo estas simpla facila, konvena por ĉiuj, kiuj komencas lerni la Internacian Lingvon. "La aventuroj de Jombor kaj Miki" estos por la legantoj pordo al mirakla mondo.

La libro estas mendebla ĉe:
Dokumenta Esperanto-Centro, Josip Pleadin – josip.pleadin@gmail.com





Erik Tantal

La Kimero

Rakonto el la estonteco

1-a Eldono 2020

Vizito

„Ĉu ne estas iom tro frue? Ĉu ni vere jam nun devas fari staĝon en instituto?“, demandis Sven legante la afiŝon en la universitato.

„Tio estas ja libervola afero“, trankviligis lin Volker, „kaj ni devas esti ĉi tie nur por du tagoj semajne, je lundo kaj sabato. Tiel ni ne neglektas niajn prelegojn“.

Do, ne estis obstakloj por la aliĝo. „Mi sendas informon al Sakura, ŝi ankaŭ devas aliĝi!“, rimarkis Sven, sed Volker tuj bremsis lin.

„Ŝi jam scias tion, mi ja informis ŝin hodiaŭ matene“. Sven devis esti trankvila por ne montri sian frustrigon. Li denove tro malfrue reagis.

La IBE (Instituto por Besto-Eksperimentoj) estis la plej moderna parto de la universitato. Meze de la enirhalo staris modelo de ĉiuj konstruaĵoj en skalo de 1 por 150. Je la muro troviĝis grandaj tabuloj kun informoj pri la apartenantaj sekcioj.

En spacoplenaj, egaj vitrinoj petolis musoj, ratoj kaj kunikloj. La enirohalo kaj ankaŭ multaj el la najbaraj koridoroj estis ĉiutage malfermitaj kaj alireblaj por ĉiuj. Tial la instituto estis amata celo por ekskursoj

de klasoj kaj familioj. La infanoj entuziasme premis sin al la vitraĵo. Ne estis facile konvinki ilin daŭrigi la ĉirkaŭiron.

La studenta grupo kolektiĝis antaŭ la modelo de la konstruaĵoj kaj atendis la gvidanton por la praktikantoj. Venis d-ro Zan, kiu unue klarigis la novan koncepton de la instituto. Pro la amaso da protestoj kontraŭ eksperimentoj kun bestoj oni instalas vere favoran kaj ĝustan tenadon por la diversaj specoj. Kompreneble ne eblis tute malebligi la suferojn de la bestoj, sed oni faris ĉion ajn por malpliigi tion. Ne nur en la enirhalo, ankaŭ en la koridoroj la baraĵoj por la bestoj ofertis preskaŭ paradizajn kondiĉojn.

Sed en la laboratorioj kaj operaciejoj regis stranga sterila malvarmo. Ĉi tie la unua ordono estis pureco. Normalaj vizitantoj neniam ricevis permeson eniri tiujn ĉambrojn. Tamen la enrigardo bone eblis, ĉar multaj muroj disponis pri grandaj montraj fenestroj. Antaŭ ĉiu ĉambro oni trovis la plej gravajn informojn pri la aktuala esploro. Nun d-ro Zan proponis, ke ĉiu libere paŝu tra la koridoroj por memstare vagi dum la venonta horo. Je eventualaj demandoj oni ja povis ricevi helpon de la kunlaboranto, kiu staris je la fino de la koridoro, preta por servado.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo **Erik Tantal**)



Ŝercoj tradukitaj

tradukis kaj sendis Antanas Vaitkevičius el Litovio

En Francio vivis iu maljunulo, kiu ĉiumatene ellitiĝadis je la kvina horo kaj ĉiumatene urĝe iradis el sia hejmo kaj disŝutadis blankan pulvoron sur la vojon. Iam preterpasanta policano demandis lin, kion li disŝutadas. La maljunulo respondis, ke tio estas kontraŭelefanta pulvero. La policano miregis:
-Sed ĉiu homo bonege konas, ke en Francio forestas elefantoj!
-Do, vi vidas: ĝi efikas!

* * *

Rano iras al la sorĉistino por ekkoni sian sorton.
- Vi renkontos belulinon, kiu deziras ekkoni ĈION pri vi.
La rano demandas:
- Bonege! Ĉu mi renkontos ŝin dum ia bankedo?
- Ne, - respondas la sorĉistino. - Dum la leciono pri biologio.

* * *

La pastro deziras aĉeti papagon.
- Ĉu vi estas certa, ke ĉi-birdo ne kriegas kaj ne blasfemas? - demandas la pastro.
- Mi estas absolute certa. Ĝi estas tre bonkondata kaj religiema birdo, - la posedanto de la vendejo garantias. - Ĉu vi vidas du ŝnuretojn sur ĝiaj gamboj? Se vi tiros la dekstran ŝnureton, la birdo deklamos La Preĝon de la Sinjoro, kaj se per alia ŝnureto vi tiros ĝian maldekstran gambon, ĝi deklamos la 23an Psalmion.
- Mirinde! - diras la pastro. - Sed kio okazos, se mi tiros ambaŭ ŝnuretojn?
- Tiam mi falos for de mia sidstangeto, vi stulta, senespera idioto! - kriegas la papago.



tradukis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio

Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 8)
(daŭrigata)



Kiu havis tempon, en tiu familio elĉerpita pro troa laboro kaj trolacigita, por okupiĝi pri Gregoro pli ol nepre necese? La mastruma buĝeto estis pli kaj pli restriktita; la servistino nun tamen estis maldungita; grandega osteca servantino, kun blanka hararo

ĉirkaŭflirtanta la kapon, venis matene kaj vespere por fari la plej maldelikatan laboron; ĉion alian prizorgis la patrino apud sia multa kudrolaboro. Okazis eĉ, ke diversaj familiaj ornamaĵoj, kiujn pli frue la patrino kaj la fratino felĉege portis dum renkontiĝoj kaj festaĵoj, estis vendataj, kiel Gregoro eksciis vespere el la ĝenerala komentado de la atingitaj prezoj. Sed la plej grava plendo estis ĉiam, ke oni ne povis forlasi tiun loĝejon tro grandan por la nunan cirkonstancoj, ĉar ne estis penseble, kiel oni transloĝigu Gregoron. Sed Gregoro ja bone komprenis, ke ne estis nur la konsidero al li, kiu malhelpis transloĝigon, ĉar lin oni povintus ja facile transporti en konvena kesto kun kelkaj aertruoj; kio precipe detenis la familion de loĝejoŝanĝo, estis pli ĝuste la kompleta senespero kaj la penso pri tio, ke ili estis frapitaj de malfeliĉo, kiel neniu alia en la tuta parenca kaj konatula rondo. Kion la mondo postulas de la malriĉuloj, tion ili plenumis ĝis ekstremo, la patro alportis la mantenmanĝon por la malaltaj bankoficistoj, la patrino oferis sin por la tolaĵo de fremduloj, la fratino kuris tien kaj reen malantaŭ la pupitro laŭ la ordonoj de la klientoj, sed por plio la fortoj de la familio jam ne sufiĉis. Kaj la vundo en la dorso ekdoloris al Gregoro kvazaŭ nove, kiam la patrino kaj fratino, enliliginte la patron, nun revenis, lasis la laboron, proksimigis siajn seĝojn, jam sidis vangĉevange; kiam nun la patrino, montrante la Gregoran ĉambron, diris: "Fermu tie la pordon, Grenjo", kaj kiam nun Gregoro estis ree en la mallumo, dum apude la virinoj intermiksas siajn larmojn aŭ eĉ senlarne algapis la tablon.

La noktojn kaj tagojn Gregoro trapasis preskaŭ sen dormo. Kelkfoje li pensis ke, ĉe la venonta malfermo de la pordo, li tute tiel kiel antaŭe reprenos en la manojn la aferojn de la familio; en liaj pensoj reaperis post longa tempo la ĉefo kaj la prokuristo, la komizoj kaj la lernoknaboj, la tiom mensbarita

servisto, du, tri amikoj de aliaj magazenoj, ĉambristino el hotelo en la provinco, aminda, pasema memoro, ĉapelvendeja kasistino, pri kiu li svatiĝis serioze, sed tro malrapide - ili ĉiuj aperis miksitaj kun fremduloj aŭ kun jam forgesitaj, sed anstataŭ helpi al li kaj lia familio, ili estis senescepte nealireblaj, kaj li estis feliĉa, kiam ili malaperis. Sed poste li eĉ tute ne havis emon zorgi pri la familio, lin plenigis nur kolero pro la malbona vartado, kaj kvankam li povis imagi al si nenion apetitan, li tamen faris planojn: kiel eniĝi en la manĝprovizejon por tie preni, kio, kvankam li ne malsatis, tamen rajte apartenis al li. Nun, sen plu pripensi, kiel oni povus fari al Gregoro apartan plezuron, la fratino rapidege ŝovis, antaŭ ol matene kaj tagmeze kuri en la magazenen, per la piedo ian ajn nutraĵon en la Gregoran ĉambron, por ĝin vespere, indiferece pri tio, ĉu la manĝaĵo estis eble nur gustumita aŭ - la plej ofta kazo - tute netuŝita, elpuŝi per movo de balailo. La purigado de la ĉambro, kion ŝi nun plenumis ĉiam vespere, tute ne plu povis esti farita pli rapide. Striaj malpuraĵoj laŭlongis la vandojn, ie kaj tie kuŝis volvaĵoj el polvo kaj koto. en la unua tempo Gregoro stariĝis dum alveno de la fratino en tiajn aparte karakterizajn angulojn, por fari al ŝi, per tia pozicio, certagrade riproĉon. Sed li certe povintus resti tie dum semajnoj, sen ke la fratino boniĝintus; ŝi ja vidis la malpuraĵon ekzakte kiel li, sed ŝi estis ĝuste decidinta ĝin lasi. Dume ŝi gardis kun tute nova sentemo, kiu cetere kaptis la tutan familion, pri tio, ke la ordigo de la Gregora ĉambro estu rezervita al ŝi. Foje la patrino submetis la Gregoran ĉambron al granda purigado, kio sukcesis nur post uzo de kelkaj siteloj da akvo - la multa malseko tamen ankaŭ afliktis Gregoron kaj li kuŝis larĝe, amarigite kaj senmova sur la kanapo -, sed la puno por la patrino sekvis senatende. Jen vespere la fratino apenaŭ rimarkis la ŝanĝon en la ĉambro Gregora, kiam ŝi, plej ofendite, kuris en la salonon kaj, malgraŭ la petege levitaj brakoj de la patrino, konvulsie ekploris, kion la gepatroj - la patro estis kompreneble vekpelita el la brakseĝo - unue mirigite kaj senhelpe rigardis; ĝis ankaŭ ili moviĝis, la patro dekstre faris riproĉojn al la patrino, ke ŝi ne lasis la Gregoran ĉambron por purigado al la fratino, dum li maldekstre alkriis la fratinton, ke ŝi neniam plu rajtos purigi la Gregoran ĉambron; dume la patrino provis treni al la dormĉambro la patron, kiu pro ekscitiĝo estis jam ekster si; la fratino, skuata de plorsingulto, per siaj etaj



pugnoj prilaboris la tablon; kaj Gregoro laŭte siblis pro kolero pri tio, ke al neniu enkapiĝis la ideo fermi la pordon kaj eviti al li tiajn vidon kaj bruegon.

Sed eĉ se la fratino, elĉerpita de sia profesia laboro, estis tedita zorgi pri Gregoro kiel antaŭe, tiam, por ke Gregoro ne estu neglektata, la patrino ankoraŭ delonge ne devintus anstataŭi ŝin. Ĉar nun ekzistis la servantino. tiu maljuna vidvino, kiu en sia longa vivo certe travivintis la plej aĉajn situaciojn helpe de sia fortika ostostrukturo, ne havis veran abomenon al Gregoro. Sen esti iel sciema, foje ŝi hazarde malfermis la pordon de la Gregora ĉambro kaj vide al Gregoro, kiu, tute surprizite, malgraŭ ke neniu lin pelis, ekkuris tien kaj reen, ŝi kunliginte la manojn en la sino, staris mirigite. De tiam ŝi ne preterlasis, matene kaj vespere ĉiam iomete malfermi la pordon kaj supraĵe enrigardi al Gregoro. Komence ŝi ankaŭ alvokis lin al si, per vortoj, kiujn ŝi verŝajne opiniis afablaj, kiel "Nu venu ĉi tien, olda sterkoskarabo!" aŭ "Nu vidu la oldan sterkulon!" Al tiaj alparoladoj Gregoro respondis per nenio, sed restis senmova sur sia loko, kvazaŭ la pordo tute ne estus malfermita. Ke oni do al tiu servantino, anstataŭ lasi ŝin laŭplaĉe senutile ĝeni lin, prefere estu doninta la ordonon, ĉiutage purigi lian ĉambron! Foje en la frua mateno - fortega pluvo, eble jam signo de la venonta printempo, frapis al la vitroj -, kiam la servantino ree komencis per siaj diroj, Gregoro estis tiom amarigita, ke li, kvazaŭ atake, tamen malrapide kaj kaduke, sin turnis kontraŭ ŝi. Sed la servantino, anstataŭ timi, nur alten levegis proksiman seĝon, kaj kiel ŝi staris kun ege malfermita buŝo, ŝia intenco estis klara, fermi la buŝon nur kiam la seĝo en ŝia mano batos sur la Gregoran dorson. "Do, ne pluen?" demandis ŝi, kiam Gregoro sin returnis, kaj ŝi trankvile restarigis la seĝon en la angulon.

Gregoro nun preskaŭ nenion plu manĝis. Nur kiam li hazarde preterpasis la preparitan manĝaĵon, li lude enbuŝigis pecon, tenis ĝin tie dum horoj kaj poste ĝin plej ofte rekaĉis. Unue li pensis, ke detenis lin de manĝo la malĝojo pro la stato de lia ĉambro, sed ĝuste kun la ŝanĝoj al la ĉambro li tre baldaŭ paciĝis. Oni estis ekkutiminta, enmeti en tiun ĉambron aĵojn, kiujn oni ne povis loki alie, kaj da tiaj aĵoj nun estis multaj, ĉar oni ludonis unu ĉambron de la loĝejo al tri sinjoroj. Tiuj gravaj sinjoroj - ĉiuj tri havis plenbarbojn, kiel Gregoro foje konstatis tra pordo-fendo - detalege celadis ordon, ne nur en sia ĉambro, sed, ĉar ili tie jam lue loĝis, en la tuta mastrumado, do precipe en la kuirejo. Senutilajn aŭ eĉ malpurajn aĵojn ili ne toleris. Krome ili estis plejparte kunportintaj sian propran meblaron. Tiukaŭze multaj aĵoj fariĝis superflujaj, kiujn, kvankam ili ne estis vendeblaj, oni tamen ne volis

forĵeti. Ĉio tia translokiĝis en la Gregoran ĉambron. Tiel ankaŭ la cindrokesto kaj la rubujo el la kuirejo. Kio nur estis en la momento senutila, tion la servantino, kiu estis ĉiam tre urĝata, simple ĵetegis en la Gregoran ĉambron; Gregoro bonŝance plej ofte vidis nur la koncernan aĵon kaj la manon, kiu ĝin tenis. La servantino havis eble la intencon, ĉe taŭgaj tempo kaj okazo repreni la aĵojn aŭ ĉiujn kune per unu fojo forĵeti, sed fakte ili restis tie, kien ili venis per la unua ĵeto, se Gregoro ne serpentumis tra la fatraso kaj ĝin ekmovis, unue devigate, ĉar neniu alia loko estis libera por krabli, sed poste kun kreskanta plezuro, kvankam li male post tiaj migradoj, ĝismorte laca kaj malĝoja, dum horoj ne moviĝis.

Ĉar la sinjoroj kelkfoje prenis ankaŭ siajn vespermanĝojn hejme en la komuna salono, la salona pordo restis dum certaj vesperoj fermita; sed Gregoro facile rezignis pri la porda malfermo, li ja kelkajn vesperojn, dum kiuj ĝi estis malferma, ne profitis, sed, sen ke la familio tion rimarkis, estis kuŝinta en la plej malluma angulo de sia ĉambro. Sed foje la servantino lasis iomete malferma la pordon al la loĝoĉambro, kaj ĝi restis tiel malferma, kiam ankaŭ la sinjoroj vespere eniris kaj oni lumigis. Ili eksidis ĉe la tablo supre, kie en antaŭaj tempoj estis manĝintaj la patro, la patrino kaj Gregoro, ili malfaldis la buŝtukojn kaj prenis tranĉilon kaj forkon enmanen. Tuj aperis en la pordo la patrino kun plado da viando kaj ĝuste malantaŭ ŝi la fratino kun plado da alte stakigitaj terpomoj. La manĝaĵo vaporis kun forta fumo. La sinjoroj klinis sin super la antaŭ ili metitajn pladojn kvazaŭ por ilin antaŭmanĝe kontroli, kaj tiu, kiu sidis en la mezo kaj de la du aliaj ŝajnis respektata kiel aŭtoritato, efektive distranĉis pecon da viando ankoraŭ sur la plado, evidente por konstati, ĉu ĝi estas sufiĉe mola aŭ ĉu ĝi eble resendotas kuirejen. Li estis kontentigita, kaj la patrino kaj la fratino, kiuj streĉe rigardis, respire ekridetis.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>



Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la naskitoj sub la signo de la « Virgulino ».

*** Viroj :**

Korpo kaj sano

Kun moviĝemaj

okuloj, trarigardemaj, inspektemaj, la buŝo sufiĉe maldika kun la lipoj kunpremitaj.

Ĝenerale sveltaj.

Kiel li reagas ?

Ili ŝatas legadon, kaj kolektas sciojn pri plej diversaj temoj, el tio kulturo ofte supraĵa, sed kiu efektas, kaj ili amas fari citaĵojn, helpataj per rimarkinda memorkapablo.

Ili ne ŝatas, ke oni haltu ilin dum parolo, kaj reprenas sian diradon tie, kie oni tranĉis ĝin. Kritikmensaj kaj harfenduloj, ne facilas diskuti kun ili, des pli, ke ili estas elokventaj, persvademaj, lerte defendas siajn rezonadojn. Ili tre ŝatas esti konsultitaj, doni konsilojn. Ili havas logikon, sanan prudenton, kompetentecojn, vidi trans la ŝajnoj kaj la nuno.

Pro sia skeptikismo la viro virgulina estas facile mokema kaj acerba.

Je kio li taŭgas ?

Por ĉiuj profesioj kie estas bezonata kalkuli, kontroli, ordigi, uzi paciencon, ekzaktecon, distingkapablon.

Oni devas konsideri ankaŭ lia flanko servema, kaj lia bezono je sindonemo, kiun li bezonas por doni

sencon al sia vivo.

Kiel li amas ?

Lia pudoro ne favorigas komunikadon. Se li parolas, tio estas por tuŝi ĉiajn temojn, krom la intimaj kaj la profundaj.

Kim li edziĝas, li vivas „apud“ sia edzino, ne „kun“ ŝi, li plenumas sian devon, zorgos pri la infanoj, ktp, sed estas aferoj pri kiuj oni ne parolas.

*** Virinoj :**

Korpo kaj sano

Kun alta frunto, arkaj brovoj, rekta nazo, malgrada buŝo.

Ŝia kuraĝo mirigas, ĉar ŝi aspektas malforta.

Iom da kvieto kaj soleco ŝi bezonas, flanko „maljuna fraŭlino“. Sed ankaŭ ne elportas longan izoladon.

Kiel ŝi reagas ?

Kiel la flandrinoj de Jacques Brel, kiam ŝi enstapligis sian rikolton la virgulino certigis al si sian sekurecon. Ŝi estas plenuminta sian devon, kaj ŝi atendas. La aferoj koaguliĝas. Kaj ŝi enfermiĝas en universo ordigita.

Je kio ŝi taŭgas ?

Sŝi estas esence farita por «servi». Kio malfermas vastan gamon da profesioj. Kie ajn ŝi estas, ŝia kompetenceco estas agnoskata, ŝi bone faras tion, kion estas farenda, ĉu estus kuiri, pretigi kuracilon, libroteni la kontadon de entrepreno, ktp.

Kiel ŝi amas ?

Ŝi estas inter tiuj virinoj kies edzoj diras : „Mia edzino estas perfekta, serioza, fidela, ŝparema... tio estas malesperiga !“ Ĉar amo mortas kun la kutimo, kaj la virgulino tro emas, instali sin, ŝpinumi, ne metante al si demandojn.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

5>> malsanulejoj.



- Amara rakonto pri amo...
- Kroma - nenecesa informo: la bofrato de Vittorio de Sica estas Ramon Mercader. Tiu estas la murdisto de Trotskij.

Sophia Loren, vi la diino de la kino, unu el la gvidaj nomoj de la rolantaro, kiu scias, kion vi pensas hodiaŭ, sole kun viaj rememoroj. Vi estas la sola postrestanta!

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
24 aŭgusto 2020, Büyükkada, Istanbul, Turkio

DUA PARTO - LA VIVO

73



Tiu, kiu bravas kiel aŭdaculo,
pereas.

Tiu, kiu bravas sen aŭdaco,
restas vivanta.

El ambaŭ specoj unu maniero ricevas gajnon,
kaj la alia damaĝon.

Sed kiu povus scii, kial ĈIELO
malamas iun?

Tiel ankaŭ estas la saĝulo:

Li scias malfacilaĵojn.

La TAŬO de l' ĈIELO ne konkuras
kaj tamen sukcese venkas.

Ĝi ne parolas

kaj tamen ĝi trovas bonan respondon.

Ĝi ne mansvingas,

kaj tamen ĉio venas per si mem.

Ĝi estas malstreĉita

kaj tamen ĝi bone planas.

La ĈIELO-reto estas tute maldensa,
sed ĝi perdas nenion.

Rimarkoj de Anniespera:

Laŭ Anniespera Laocio ne uzas la esprimon
„kverelas“, germane „streiten“ ĉe Vilhelmo, sed
„konkuri“.

Rimarkoj de Cezar

Mi do tradukis ĝin tiel, ĉar „kvereli“ kaj „konkuri“ sinonime rigardate estas tre similaj. Tamen „kvereli“ havas negativan flankon, kaj „konkuri“ estas pli sobra esprimo. Mia tasko kompreneble estas – tion oni ne forgesu eĉ dum sekundo – traduki Rikardo Vilhelmon kaj ne la originalan tekston de Laocio. Tial mi tradukas laŭ Vilhelmo ankaŭ tiukaze, se tiu evidente eraras. La rimarkoj de Anniespera ja atentigas pri tio, kio ne estas en ordo, kaj tiel la legantoj ricevas pluan eblon proksimiĝi al la originalo. Wang Chongfang tradukis Laocion bonege, sed de tempo al tempo tradukas Vilhelmo estetike eĉ iom pli bone ol li. Do ambaŭ tradukoj havas sian valoron. Vilhelmo montras unuavice kiel oni konas Laocion en Eŭropo kaj Wang Chongfang, la ĉino, estas sendube pli proksima al la originalo ol Vilhelmo.

Ekzemple la duan parton de la ĉapitro tradukas Wang Chongfang pli bone kaj eĉ multe pli elegante:

„Estas la Taŭo de la Ĉielo,

Kiu ne batalas kaj tamen lerte gajnas venkon,

Kiu ne parolas kaj tamen lerte faras respondon,

Kiu, kvankam ne vokite, venas propramove,

Kiu, kvankam malrapide, lerte planas.

Vasta estas la reto de la Ĉielo,

Kaj grandaj estas ĝiaj maŝoj, sed ĝi lasas al nenio
ilin trairi.“

Pri plua rimarko de Anniespera

Ŝi proponis uzi la esprimon „maldensa reto“. Kaj mi volonte akceptis tion.

(daŭrigota)

Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Akeoj

*Maurico Druon, sekretario de la Franca Akademio diris:
"Albanoj apartenas al popoloj pli malnovaj ol mem historio. Praavoj de albanoj partoprenis en la Milito de Trojo, gviditaj de Akilo, unuflanke kaj Hektoro, aliflanke."*

Pelazga brava raso
iradis vi al milito
kvazaŭ al nuptofesto
rajde sur rapida ĉevalo,


Aventuroj kaj luktoj
Estis parto de vivo via
samkiel samrasaj gentoj,

estis ankaŭ trojanoj.
Bravaj kaj fieraj dardanoj,
tiel pensadas greka historiisto
adore kaj maĝoje
ili estis barbaroj simple.

Enamiĝinte al historio
kaj gloro de lia lando.
diris al si, ho se ili estus
kiel oni diris, vere grekoj

Konvinkita, ke neniu inventaĵo
povas resti kaŝita porĉiam

Tirana, 28.03.2016





Afrikana studento, paŝtelo, 30x40 cm-oj, 1983


En la laborista junulara klubo "Alberto Corvalan" mi gvidis ek de 1977 la rondeton de pentroarto. Heike M., kiu partoprenis la rondeton, iutage montris al mi belan nigra-blankan foton en poŝtkarta formato kaj demandis min, kielmaniere oni povas pentri tiaĵon. Tuj mi devis pensi pri okazintaĵo iam ajn en la Nationala Galerio de Berlino -- kiam mi estis forte admiranta belegan desegnaĵon de Franz von Lenbach (Franco de Lenbaŝ).

El mia ŝranko, plena je pentroartaj materialoj, mi elektis la okrokoloran desegnoblokon kun la malglata papero, kiu ŝajnas esti pakpapero, kaj du kestojn kun paŝtelaj kretoj. Mi havis klaran farban koncepton.

"Atentu", mi diris al Heike, "tielmaniere oni faras tion". Kaj tuj mi komencis desegni la krispajn harojn per nigra kreto. Facile, casi ŝvebante dancis la kretogrifelo super la malglata papero ke tuj estiĝis impresoj de krispa hararo. Heike staris je mia maldekstra flanko kaj desegnis similforme sur sia folio. La foto kaj la paŝtelaj kretoj kuŝis sur la tablo inter ni tiele, ke ĉiu el ni facile povis rigardi la aĵojn. Per fingra signo mi instigis ŝin pliabundigi la hararon laŭ la formo de l' kapo. Do, la hararo nun estis finita. Nun ni formis plastike la brilan frunton -- per kaj pli helaj kaj pli malhelaj brunfarboj, kaj pli aŭ malpli forta premo. La lumo meze de la frunto efikas kiel fenestro. "Pli mola, pli mola, vidu la mildajn transiraĵojn!" avertis mi, instruante precizan rigardon. "Kaj tiu lumo dekstre, maldekstre kaj supre en la frunto kiel limigo al harkomenco, tute milda!" mi aldonis. "Kaj rigardu foje la lumon super la brovo; foje palpu ankaŭ je via korpo la ostojn kiel la plej altaj lokoj, sur kiujn falas la lumo, kaj vidu la elegantajn kurbojn de la brovoj", mi instruis en ege pedanta maniero. Mi estis en mia elemento

kiel gvidantino de l' pentroarta rondeto. La kreivaj momentoj havigis flugilojn al Heike. La portretojn finformiĝis.

Finigu la manĝon kiam gustas plej bone, diras proverbo. Nia tempo pasis. "Ĉu vi favore pruntedonus al mi tiun foton ĝis la sekvanta semajno? Mi intencas pludesegni en hejma trankvilo", mi petis al Heike. Ŝi jesis kun feliĉaj okuloj. Fininte la vespermanĝon mi tuj fuĝis al mia ateliero apud Kirchplatz (placo de preĝejo). La tutan nokton mi desegnis: la brilantajn brunajn okulojn, la larĝan afrikan nazon, la dikajn lipojn en milda kolornuanco, la ombrojn ĉirkaŭ la lipoj, la lumojn sur la buŝo, sur la mentono. Por mi, tiu portreto egalas al ĝoja ekspedicio! Nenia-kaze enua! Kaj nun, aldona, tiu unika orelo! La lumo, ĉirkaŭanta la karakterizan makzeloston, intensigis la plastikan efekton! Kaj tiu kolo kun sia haŭtkoloro! Mi rememoras pri la pura ĝojo, kiu plenigis min desegnante la portreton. Post la kolumo aludis la ŝultron nur malforte. Similan faritaĵon mi estis vidinta en la bildo de Franz von Lenbach. Mi evitis pentri la ĉemison komplete blanka. Kiam la frumateno heligis la atelieron, mi signis la portreton kaj estis feliĉa homo, ĉar mi sukcesis montri al Heike, kielmaniere oni pentras "tiaĵon". Kaj ŝi, aminda en sia aparta maniero, kompletigis sian propran Portreton de Afrikano laŭ mia modelo.



Postparolo

Jenan Portreton de Afrikano mi ofte ekspoziciis komune kun mia verkistino Aleida de Kubo. Poste mi eksciis en interreto ke ŝi estas la fama filino de fama Ĉikevara.

Aldone bildeton el mia infana tempo: "Ni volas pacon!" Supre afrika knabo kun grandaj okuloj, meze blonda helhaŭta knabino kaj sube aziana knabino - tenanta packolombon.



sendis Helga Plötner portretistino el Germanio

Divido kaj subtraho

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Se ni dividas aŭ subtrahas 4 per 2 la rezultato estas 2.

Demando

Kiu nombro havas similan econ dividite kaj subtrahite per 3?

Solvo

$$X - 3 = X / 3$$

$$3X - 9 = X$$

$$2X = 9$$

$$X = 4.5$$



Ŝercoj



Mia edzino kaj mi estis feliĉaj dum dudek jaroj. Poste ni konatiĝis.

Finfine la vampiro diras:
— Ĉu vi neniam vidis nutraĵojn?

Rodney Dangerfield

SEKURECO

Amantoj pasas per aŭto. La viro kun unu mano brakumas la virinon. Policisto fermas ilin kaj diras la sekvajn: Sinjoro! Ĉu ne estus pli bone per du manoj? -Vi pravas sed.... kiu tenas la direktilon?

KLARIGO

Policano demandas sian kolegon:
Kiel estas eble devojigi tiujn grandegajn flugmaŝinojn?
Aŭskultu bovo:
Tiujn oni devojigas ne ĉi tie sed tie supre kie ili estas tute malgrandaj.

Vampiro enbusiĝas kun ĉerko.
La pasaĝeroj mire rigardas lin.



Krucvortenigmo


HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. ___ prenas, ___ pagas (Zamenhof); 6. Molekulo havanta nenulan dupoluson; 7. Sufikso esprimanta "membro de grupo"; 8. Malutil', damaĝ'; 9. Turnbumon de unu flanko de la masto al la alia; 11. La litero N; 12. Angulon malpli grandan ol orto; 14. Havos sufiĉon.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilata al la baza tono de gamo; 2. Ilo ___ oro taŭgas por ĉiu laboro; 3. Pli-___pli; 4. Tempo ___ , tempo pagas; 5. Verdan lokon en la dezerto; 6. Tempo prenas, tempo ___ ; 10. Kovr' per tero; 13. La litero T.

Fonto: **Semajno de Enigmoj #6**
<http://www.semajnodeenigmoj.com>



(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

27>> Ŝajnis, ke ŝia patro faris tion.

La sekvantan matenon ŝi revivis, kaj vidis sinpendumintan patron kaj mortintajn patrinojn kaj pli maljunan fratinojn apude. Ĉirkaŭe estis multaj kadavroj. "Mi forlasis la lokon, ne dirinte adiaŭon al miaj mortintaj familianoj. Eĉ en sonĝo mi volas renkonti ilin", ŝi diris. Ŝi neniam antaŭe parolis pri tiu sperto, eĉ al siaj familianoj, ĉar ŝi ne volis kulpigi sian patron. Lastatempe ŝi sentas proksimiĝon de milito, tial, por ke milito neniam okazu denove, ŝi decidis paroli pri sia sperto.

En Okinavo la registaro konstruigas grandegan usonan militbazon en la maro de Henoko kontraŭ la volo de la okinavanoj. (Foto) S-ino Kinĵoo diras, "Ŝajnas al mi, ke la registaro pretigas sin por komenci militon. La ĉefministro diras, ke li ne volas militon, sed se tio estus vero, kial li konstruigas la militbazon? En la bela maro ne estas necesa malbela militbazo. Vivo estas la plej valora. Mi volas, ke paco regu en la mondo eterne".

(daŭrigota)

Vesperiĝis bele.

Rigardante supren, mi salutis la stelojn, mirantajn la okazintaĵojn de tiu vespero ĉisube, en urbo de mia naskiĝ-lando, meze de la Mediteraneo, kiu bedaŭrinde iĝis vasta tombejo, pro la fakto ke multaj, lasintaj la Libion por trovi liberon en Eŭropon, perdis sian vivon en la vasta maro.



Mi troviĝis en Ĥal Qormi, malnova urbo, kies popolon oni insultas, por ĝin ofendi, per la vortoj: "rezonantoj nur ĝis tagmezo". Oni kredas, ke tion kaŭzis murhorloĝo sur unu flanko de la tiurba preĝejo, kiu montras la sun-horon ĝis nur tagmezo. Troviĝas alia motivo: ĉar la loka moro montras, ke tiurbaj laboristoj drinkis iom pli da vino je tagmezo, oni do kredis, ke ĉi viroj ne plu rezonas.

Kvankam ĉi urbo troviĝas mar-nivele, oni kredas, ke antikvece la maro vastiĝis ĝis tien; ĝi estas eble la nura urbo, kie la komerco kreiĝas per ĝia loĝantaro mem: bakistoj, stivistoj, kaj aliaj ĉiuspecaj laborantoj.

Tiel ĝi estas urbo, riĉa je homoj uzantoj kaj la menson kaj la manon eble pli ol aliaj. Mi ne forgesu diri, ke ĝi estas famekonata pro kleraj negocistoj, kiuj ekzistis tie ekde longe.



Speciala okazaĵo. Fariĝis ducent-jara la ĉestrata ŝtona statuo de Sankta Sebastiano, kiun iam la loĝantaro starigis, kiel dankesprimon al Dio kaj al tiu Sanktulo, kiuj liberigis ilin el la epidemio de la ĥolero.

Tiu vespero estis rava por mi pro diversaj motivoj.

Unue mi antaŭlonge vizitis la lokon; due, tie

okazis laŭkutime bunta festo pro la fakto, ke el la proksima paroĥo de Sankta Georgo, post la dankesprima meso, marŝadis ĝis la alia paroĥo de Sankta Sebastiano la tri lokaj muzik-bandoj.

Vera muzik-spektaklo!

Band-muziko, ia ajn kaj kie ajn, min ege ĝojigas.

Tiumomente mi marŝadis kun la bando. Nekutime. Mi neniam en mia vivo partoprenis tian etoson, pro la fakto, ke mi malŝatas marŝi, halti, marŝi, halti. Tamen mi sentis, ke la glora sonado de tiuj muzik-instrumentoj ĝojigas min. Tiujn batojn sur la tamburon, anstataŭantan la muzik-estron, mi sentis bati en mian koron kaj min entuziasmigi.

Kutime kiam, estante malĝoja, mi aŭdas muzik-bandon, mi tuj sentas min feliĉega.

Iel, kiam mi atingis la ŝton-statuon de Sankta Sebastiano, mi eniris kafejon. Sur la vendo-benke, mi vidis pasticojn.¹

"Jen ĉio por mi!" diris mi al mi mem. Nu ĉu mi nur rigardu? Se mi manĝus unu, du, el

ili, mi neniun ofendus, krom versajne mian stomakon. Sed antaŭ pasticoj, mia stomako neniam lamentis, almenaŭ ĝis nun.

Mi tuj sidiĝis apud maljunulo. La kafejestro salutis min.

"Ĉu vi ne kunportis vian pipon, Bast?" demandis la apudulon unu el la sidiĝintoj? Ŝajnis, ke ili bone konas unu la alian.

"Pipo? Ne, ne! Ĉu vi ne konas la hodiaŭan situacion? Oni ne povas fumi sen ofendi apudulon, senkonsidere de lia abomena rigardo?"

Ĉimomente ili aŭdis la kafej-estron de malantaŭ la vendo-benke: "Atentu, Bast, bonvole...ne fumu! Policanoj troviĝas ĉirkaŭe. Atentu!"

"Ne grumblu," respondis la maljunulo; "Alportu drinkaĵon. Vi bone scias, kion mi preferas."

Poste, li rigardis nin dirante: "Ĉu mi proponu al vi ian drinkaĵon, amikoj? Sincere!"

Ĉiuj dankemis. Ankaŭ mi. Verŝajne la aliaj jam





sufiĉe drinkis: teon aŭ kafon kaj iuj ankaŭ pasticojn.

Bastjan, la apuda maljunulo tuj rigardis nin dirante: "Ĉar mi, amikoj, mi similas al mia

ĉinokte mi ne dormos antaŭ ol komemci la unuan ĉapitron. Dankon, Bastjan, pri tio, vi kulpas."

Ĉiuj aplaŭdis.

"Bravulo!" kriis Bastjan, "oni por vi mendu du pasticojn, ĉu ne?"

"Ne, Bast, ne. Mia stomako estas plenplena.

Eble ĉu mi proponu ion plu por vi, amikoj?"

Sed

ŝajnis, ke ĉiuj estas jam plene kontentaj, aŭ eble atentemaj



ĝemelo. Ni senscie faras multon samtempe. Tion ni rimarkas post la faro. Alia afero: mi kaj mia frato travivis nekredoblan travivaĵon. Se mi estus verkinto, mi verkus elstaran romanon. Plenplenan romanon eĉ!"

La apudulo ekrimarkis: "Nu...unue ellernu skribi kaj vi certe ekverkus ĝin."

"Nu, vidu," diris denove Bastjan, "Mi ne estas tiom malklera, tamen mi ne kapablas verki libron. Jen ĉio!"

Ĉifoje estis mia vico: "Sinjoro Bastjan..."

"Kial ĉi vorto 'Sinjoro'?" li ekkriis; "sufiĉas mia nomo."

"Do...nur 'Bastjan'.."

"Bone, tio sufiĉas!"

"Vidu, Bastjan," diris mi denove, "Viaj vortoj estas tiklantaj mian manon por verki tiun romanon. Ĉu vi iam vidis sorbopaperon?"

"Nu...multfoje! En la lernejo. Tamen mi neniam makuligis ĝin," diris li ridante, eĉ nin ridigante.

"Sorbopapero!" daŭrigis mi denove; memoru, kiom facile ĝi sorbas la inkon. Same...ĉimomente, mia menso estas ensorbanta, kion mi verkos. Sekve,

por ke, kiam ili revenos hejmen, ilia edzino ne ofendiĝu se ili ne manĝus, kion ŝi estus preparinta.

Tiumomente surstrate, la muzikistoj jam malaperis; eĉ la popolo ekpensis aliri hejmen; mi ne malpli!

La stratoj malpleniĝis kaj eksilentis. Nur busoj trairis tra tiu ĉefa urbo-strato.

Linibusoj tuj ekhaltis ĝuste antaŭ la kafejo, el kie mi foriris. Mi tuj enbusiĝis, montris al la stiristo mian bileton, kaj sidiĝis ĉe la meza buso-seĝo, samtempe pensante kiel komenci verki mian unuan ĉapitron de la nova romano.

¹ El la malta: "Pastizzi, pluralo de 'pastizz'; ĝi estas fromaĝ- kaj piz-kuko tre manĝata en Malto.

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto (el la unua romano)

Hajkoj

verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Fino de l'nokto.
La horloĝo mezuras
mian solecon.

Senluna nokto
ie plorĝemas gitar'
Soleca seĝo.

Aŭtuno! Pluvas!
La birdoj flugas suden.
Sonas l'lernejo.

Kiom da aŭtunoj
signas l'alendaro...Mi
ne forgesas vin

Kato soleca
ĉe la sojlo tremeĝas.
La domo mutas.

Sur juglandarboj
la kornikoj rondflugas.
La vintro longa.

Malvarmetiĝas!
La krizantemoj velkas.
Dolĉa estas l'te'.


Timema cervin'
trans la padoj forkuras.
L' ĉasistoj gvatas.

Renversis l'nokto
en la fajran matenon.
La tago ekpaŝis

Ĉambro.Piano.
La klavoj ekŝtormegas.
Matena kafo.

Pulm' de kolombo
alflugis. Ĉu estas am'
aŭ disiĝ' estas.

L'bordo dezertas
Nur la ondo tenere
kisas la sablon.



verkis kaj sendis
Ivaniĉka Maĝarova
el Bulgario

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

POST 1936

En la jaro 1936 mi biciklis ĉirkaŭ en Francujo. Pasintan jaron mi priskribis ĝin en A. E. Mi ripetas el tio tri interesajn okazojn. 1). Kiam en Lyons (Liono) en orienta Francujo, mi por peti tranoktejon vizitis la direktoron de la liona radiostacio, D.ro Borel, kaj en lia domo renkontis unu el la du filinoj de D.ro Zamenhof, nome Lydia, populara instruisto de la lingvo de sia patro en la universitato de Lyons 2). Post unu monato da biciklado mi iris al la franc-hispana landlimo por tie eniri Hispanujon por tie militi kun la oficiala demokrata registaro kontraŭ la armeo de la diktatoro Franco kiu kaptis duonon de la lando, kun la helpo de Mussolini, de Hitler, de la registaro de Francujo kaj de la registaro de Grandbritujo; oni ne akceptis min ĉar ili ne havis sufiĉe da armiloj. 3). Mi en suda Francujo trovis Esperantan fianĉinon, la filinon de la edzino de la franca Esperantisto kiu per memfarita vagoneto sur radoj vojaĝis el de Rusujo sur la siberia vagonarvojo al Vladivostoko.

El kun la jaro 1937 ĝis la komenco de la dua mondmilito mi vojaĝis, kelkfoje kun miaj gepatroj, al kaj partoprenis en naciaj kongresoj de la nederlanda Laborista Esperanto –Asocio kaj en la eŭropaj kongresoj de Sennacieca Asocio Tutmonda. Plej ofte mi vojaĝis al tiuj kongresoj per biciklo. Unu fojon ni vojaĝis al la kongreso en la jaĥteto de miaj gepatroj, kaj tranoktis en ĝi. En tiuj kongresoj mia precipa laboro estis vendi kaj propagandi la dudekpaĝan politikan gazeton “Klasbatalo”. Post mia retroveno el de Francujo, en la fino de la jaro 1936, mi decidis eldoni tiun gazeton kun la helpo de tri aliaj membroj de la nederlanda marksisma kontraŭbolŝevisma grupo de Internaciaj Komunistoj aŭ “Konsilantarkomunistoj”, kiuj estis internacie malgranda movado. Malgranda, ĉar ili ne rajtis ekzisti en la hitlera Germanujo nek en la lenina Rusujo nek en la musolinia Italujo nek en la franka Hispanujo nek en la “demokrata” Usono. En mia urbo Amsterdamo mi trovis tri membrojn, volantajn lerni Esperanton por tio, i.a. Bruun van Albada, kiu perfekte lernis la lingvon en unu nokto, ĉar li havis en Nederlando la plej altan inteligento-kvoton. La du aliaj rapide lernis, por povi helpi min baldaŭ. Dudek paĝoj da intensaj kaj ne refuteblaj fundaj artikoloj pri la marksismo ja estas multe por ĉiu monato. Ni baldaŭ ricevis samopiniajn amikojn en Parizo. Do tiujn gazetojn mi propagandis kaj vendis en

la kongresoj, sufiĉe multnombre. Ankaŭ tutmonde konataj Esperantistoj simpatiis kun ni. Vojaĝi tra Germanujo estis permesita, sed ne bicikle, nur aŭtobuse aŭ vagonare, same kiel tuj post la milito en la de Britujo okupita parto de Germanujo.

Kvankam en la kvar jaroj antaŭ la milito mia plej grava laboro estis la eldonado de la gazeto “Klasbatalo” kaj ĝia disvastigado en la kongresoj, kelkfoje du en la jaro, mi ege aktivis en la mallongtempa, du jarojn, splitiĝo en du de la nederlanda laborista Esperanto-Asocio. Mi ne priskribos ĝin nun, ĉar ĵusan jaron mi faris tion en A.E. Dum preskaŭ du jaroj da interbatalo inter la du partioj, mi organizis kaj propagandis la starigon de ekstra laborista Esperantoorganizo en Nederlando, pli kunlabora kun S.A.T. Krome, en la fino de 1936, mi ricevis labordungiĝon en malgranda banko, rilatanta al grupo de germanaj bankoj. Tiun oficon, kvankam malaltan, mi ricevis de unu el la direktoroj de la banko. En tiu tempo ekzistis organizo de riĉuloj kiuj, per donacado de ekstraj nutraĵoj, helpis senlaborulojn kiuj klare estis politike dekstraj, konservativaj. La edzino de tiu bankdirektoro iomete pentradis, volante esti artistino. Por helpi en la organizo ŝi elektis verajn artistojn. Tiel ŝi vizitis dufoje en la monato miajn gepatrojn kun granda sako da normalaj manĝaĵoj ofte tro multekostaj por senlaboruloj. Miaj gepatroj igis ilin legi la leterojn kiujn mi regule sendis por rakonti miajn travivaĵojn dum mia kvinmonata biciklado tra Francujo. La geriĉuloj trovis min tial tiom brava kaj entreprena, ke li konkludis ke mi estus bona dungito en sia banko. Mi tute ne ŝatis la laboron en banko, kaj kiam mi ne havis ion farendan dum mia laboro, mi senkaŝe legis libron, nome “La Kapitalo” de Karlo Marks. Malgraŭe unu subdirektoro savis min ĵetati en malliberulejon por kelkaj jaroj pro pli frue senrajte fuĝinti el la nederlanda armeo. Li tie havis altan rangon. Tamen la armeo decidis ke mi devis reaniĝi al la armeo (por fari tie mian unukajduonjaran militan servon), sed mi tuj deklaris min malsana, per la skriba atesto de antaŭa kuracisto, kaj post unu monato tie oni maldungis min el la armeo por ĉiam (“pro korpaj difektoj”). Mi do povis redungati de la banko.

Tuj kiam la milito eksplodis, en Ĉeĥoslovakujo, internacia vojaĝado en Eŭropo ne plu eblis: Mi kaj mia fratino estis en la sudo de Francujo (por viziti mian fianĉinon) kaj trafis la lastan vagonaron el de Parizo al Amsterdamo. La nombro de la al Nederlando hejmvvojaĝantoj estis tiom granda, ke dum la tuta



vojaĝo ni devis stari en brutvagonoj pakite kiel sardinoj en skatoleto. Sed ni bonŝancis, ĉar se ni ne trafus tiun lastan vagonaron, ni devus dum la milito resti en Francujo, kiu okupatis de Hitler antaŭ ol Nederlando.

Dum la okupado de Nederlando ate de la hitlera Germanujo la laboristaj kluboj kaj asocioj ne rajtis ekzisti, sed jes la neŭtralaj Esperantistoj, dum kelkaj jaroj. Ĉi lastaj okazigis sufiĉe grandan kunvenon por subteni iun sinjoron Manders kiu volis peti la Akademion de Esperanto nuligi la Fundament'an regulon ke la rekta objekto devas esti en la akuzativo (kun la finaĵo "-n"). La Akademio kompreneble ne akceptis tiun peton, sed post la milito ĝi akceptis tiun sinjoron Manders kiel membron. Post la unua jaro de la milito en Nederlando la germanaj okupantoj deklaris ke ĉiuj viroj nederlandaj devis iri al Germanujo por tie labori en la fabrikoj. El de tiu jaro ĝis la fino de la milito mi do devis kaŝi min. Biciklante en la stratoj mi riskis kaptati de tiucelaj policanoj. Mi tamen faris de tempo al tempo. Kelkfoje la milita polico senaverte okupis blokon de domoj kaj serĉis en ĉiuj domoj judojn kaj komunistojn kaj junajn virojn kaj virinojn. Ofte la

“subteruloj” avertis nin, sed ne ĉiam povis. Oni do devis kaŝi sin sub la planko aŭ malantaŭ muroj. Mi estis bonŝanca ĉar malantaŭ nia domo kaj nia ĝardeno estis la neuzata granda domo apartenanta al la germana urbestro de Amsterdamo, kaj mi havis ŝlosilon por eniri ĉar mi kaj la aliaj najbaroj devis laŭvice protekti la domon; la germana polico ne rajtis eniri en tiun domon. Ĉar mi ne plu povis vojaĝi, mi devis forlasi la bankon. Sed miaj gepatroj plu ricevis senlaborulan pagon, kaj cetere mono ne helpis aĉeti nutraĵon ĉar la butikoj vendis nur vian kvanton. Por havi pli da manĝaĵoj miaj maljunaj gepatroj devis bicikli al la farmistoj por el de ili aĉeti ekstrapajn terpomojn aŭ tritikon. Nur la malgrandaj farmistoj helpis la ordinaran popolon, sed la riĉegaj farmistoj vendis nur kontraŭ oro aŭ valoraj objektoj, kion ni ne havis.

Ni ricevadis, sekrete, la novaĵojn pri la milito el de la britaj radiostacioj, sed ili silentis pri Esperanto.

de **Marcel Leereveld** el Aŭstralio

Fonto: **Aŭstraliaj Esperantistoj** AE 485

Al la gesamideanoj!		verkis kaj sendis Gafur Mirzabaev el Uzbekio	
En ĉi-Festa Tago la inspir' alvenas	Karaj, nin atendas ja plej helaj tagoj!	Por atingi celon kiu certe revas	Esperu ni ĉiuj! Sur la sama Tero
Elkoraj deziroj al Vi karaj, jenas:	Baldaŭ ĉiulande ŝvebos verdaĵ flagoj!	Sur la vojo de l'cel' laciĝi ne devas!	Konkeros la Mondon nia pura Vero!
Por la grava Venko, por la cel' konkreta	Al Vi ĉiuj mi plu jen kion aldiros:	Ni devas la lingvon senĉese plu ami!	Ĉe la fino, karaj tenante la manon
Vi – veraj verduloj, ĉiam estu preta!	Venos temp' la lingvon la tutMondo miros!	Por iri antaŭen ni ne devas lami!	Mi al vi deziras Sukcesojn kaj Sanon!
Se kune, agorde ni antaŭen iros	Jen, kia Vin, karaj estas mia peto:	Nur antaŭen iru ni komune ĉiam!	<i>la 26-an de julio, 2020</i> <i>Taŝkento, UZBEKIO</i>
La longatendatan Venkon ni akiros!	Por la cel' ni paŝu kun forta impeto!	Ni paŝu vikle, sed ekstumblu neniam!	_____ * – L. L. <i>Zamenhoff</i>
Mi diras la Veron, mi ne elokventas!	Ni iru kuraĝe kune man' en mane!	Ni atingu Venkon! Tio gravas, endas!	de Gafur
La baldaŭan Venkon mi plenkore sentas!	Nia kunmovado ne perdiĝos vane!	Tion la Mentoro* de ni ja atendas!	Mirzabaev el Uzbekio 

>>24 malvarme. Uli klarigis, ŝi trovis ĝin en tendo de geologoj. Mamuta osto. Ni en tendoj de geologoj multajn aĵojn trovadis.

Ĝis nun mi ne povas kompreni, ĉu tiu veterano de Esperanto movado en tundro diris al mi veron, aŭ nur ŝercis.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Tiu ĉi rakonto ne estus naskiĝinta, se ne mia amiko Ago Uli. Li estas indiĝena loĝanto de trans la Arkta cirklo kaj veterano de loka esperantista movado, ankaŭ fakdelegito de UEA pri tundro.

Mi interkonatiĝis kun Ago Uli perletere kaj nia interkorespondado daŭras multajn jarojn. Jam delonge Ago Uli invitas min gastigi ĉe li. Tamen pro tempomanko kaj grandaj distancoj mi prokrastis mian vojaĝon.

Tamen unufoje mi decidis:

- Necesas vojaĝi, ĉar tempo kuras kaj mi aĝe jam ne estas juna.

Tundron oni povas atingi per aviadilo kaj helikoptere. De la birda flugo la tundro aspektas makulita: tiuj makuloj – estas marĉoj, kio verdetas – estas herbaro.

La vilaĝon de Ago Uli mi atingis per helikoptero, kune kun geologoj. En tundro mi eksentis min vera nobelo. La arboj pli alten ol miaj ŝultroj ne kreskas. Tamen beroj grandegas. La plej firma valuto en tundro – estas likva. La peco da kolbaso kostas duonlitron da brando. La felo de polusa vulpo – egalas litron da brando. Litro da alkoholo – du duonlitroj da brando. Tion mi eksciis (kompreneble kontraŭ duonlitro) ĉe geologoj. Kiam la helikoptero surteriĝis en bazo de geologoj, nin aliris diketa maljunulo. Iom poste iĝis klare, ke nur lia vizaĝo estis diketa. Lia vizaĝo ankaŭ similis tundron – „la flaŭro“ estis mizera.

- Ho, saluton! Ho Mikas. Bonvenon en tundron. Mi donacas ĝin al Vi.

Post niaj intersalutoj kaj konatiĝo, Ago Uli invitis min al sia hejmo. Ago Uli iris antaŭe, mi postiris lin. Subite li ekhaltis, retrofleksis kapon, ekflaris aeron kaj diris:

- Estos neĝpluvo.

- Sed kiel vi prognozis? – ekmiris mi.

- Radioricevilo anoncis – ridetas Uli.

Ni iris plu. Antaŭe aperis rivereto. Uli preparis kaj saltis. Ne transsaltis. Pruvis ankoraŭfoje – falis rekte en akvon. Elakviĝis Uli, forskuis akvon:

- Ho, en juneco similis mi aglon, sed kiam maljuniĝis mi arbostumpo iĝis!

Veninte sur la korton de Uli, ni ekbruligis apud lia domo lignofajron.

Apenaŭ mi aperigis botelon da brando, ne atendite ekapudis grizhara virino.

- Ho, vipuro, - kolere eldiris Ago Uli. – Eksentis. Ŝi ne permesos nun al ni normale eldrinki por konatiĝo. Ŝi ankaŭ ekdeziros.

- Ĉu edzino? – ekdemandis mi.

- Pli malbone, – respondis Uli.

- Adu, mia filino.

- Sed pro kio pli malbonas? – ekinteresiĝis mi.

- Edzinon oni povas batmortigi, sed filinon, ne. Ŝi ankaŭ parolas Esperanton kaj riparas miajn botojn.

Adu eksidis apud ni, ekfumis pipon. Ni eldrinkis.

- Ĉu vi estas fraŭlo? – subite Uli demandis min.

- Edziĝinta – respondis mi.

- Aaa. Verdire, edzinigu vi mian filinon. – zorgoplenas Uli.

- Pro kio? Ĉar mi havas edzinon.

- Bedaŭrinde... mi venus al vi gastigi... kun esperantistoj ni babilus... brandon ni eldrinkus... televidilon ni rigardus...

- Sed vi eĉ televidilon ne havas? – interesiĝas mi.

- Havas ni ĝin. Tamen malbonan. Nenion interesan montras... .Kiom da karbo ministoj elfosas. Pro kio taŭgas tiu kolorbilda televidilo, se nur fulgajn karboministojn vidigas. Mi pafis unufoje al ĝi. Bedaŭrinde mi ne trafis. – rakontas Uli. – Mi estas vera trafisto. Mi trafas en okulon de sciuro. Kvankam ne ĉiam el la unua fojo, tamen...

Ago Uli finmanĝis, forprenis el la buŝo ununuran denton, atente purigis ĝin en la maniko de jako kaj ree enbuŝigis ĝin.

Ago Uli ekfumis pipon, ekstaris kaj forlasis nin. Adu por ne silenti rakontis al mi, kiel de kutimigi edzon de drinkado. Oni prenu teleron, brandon kaj iru en arbaron. Metu la teleron sur formikejon, verŝu iom da brando kaj observu, kiuj formikoj drinkas, kaj kiuj kuras for. Tiujn, eldrinkantajn, oni ne prenu, sed kolektu nur „abstinulojn“. Tiam portu ilin hejmen, sekigu, pistu kaj kaŝe enŝutu en la glason de sia karulo. Ŝi tiel faris. Ne klaras, ĉu ŝia edzo ĉesis drinki, ĉu ne, sed ŝin, sian edzinon Adu, li certe forlasis.

Post iom da tempo nin aliris Ago Uli kaj ankoraŭ unu virino.

- Ĉu ankaŭ filino? – demandas mi.

- Ofendigas vi min – diras Uli. – Ŝi estas Umo – mia edzino.

- Tamen ŝi aspektas pli june ol via filino – interesiĝas mi.

- Do edzino, la dua, filino la unua – klarigas al mi Uli. – Mia edzino pli riĉas ol mi je haroj sur sia vizaĝo.

Uli envias ŝin. Poste li enmanigis al mi tranĉilon kun osta tenilo... kaj tuj forprenis ĝin.

- El la ostoj de mia eksedzino – aldonis Uli.

Por la unua fojo en tundro subite al mi iĝis

>>23

NOVA ROMANO DE JULIAN MODEST

TRA LA PADOJ DE LA VIVO
romano, originale verkista en Esperanto

En la romano "Tra la padoj de la vivo" Julian Modest talente priskribis la luktojn de sola patrino kun filino, la konfrontojn, la proponojn plej diversajn, ofte ne utilajn, eĉ dubindajn. Ĉu la protagonisto sukcesas ĉiam esti forta virino? Ĉu ŝi ĉiam faras la ĝustajn decidojn? Tiu ĉi romano kunportas vin sur la pado tra ŝia vivo kaj rivelos al vi la respondojn.


"Do, tiuj estas la elementoj kaj la altnivela dialogo subkuŝanta la simplan tekston verkitan de Modest, aŭtoro kiu kaj per rekonstruado de la lilita mito, kaj per dialogo kun la plej grava teksto de la kristana kulturo, rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante alfrontas la defiojn, kaj venki la pruvon de l' tempo, kaj prezenti al la esperantlingva legantaro novan verkon, per kiu li denove montras sin plene kapabla reklami por si plenrajtan seĝon inter la eminentuloj

de la Verda Parnaso. Ĉi-sence, oni ja povas aserti, ke (finfine!) Modest reprenas la ĝustan padon kaj batalas la bonan batalon; kaj ĉar pri gardado de la fido ne estas dubo, mankas nur scii ĉu per novaj verkoj li finos la kuradon. "

El la antaŭparolo de **Fernando Pita**
Rio-de-Ĵaneiro, la 08-an de Majo 2020

La libron eldonis
Eldonejo "Libera",
Belgio.

La libro estas aĉetebla
ĉe la eldonejo kaj ĉe
UEA.

Tra la padoj
de la vivo

Julian Modest

Ĝojan 75 jaran naskiĝtagon!

Ĝojan 75 jaran naskiĝtagon
al nia asocia prezidanto
Shaban Ali Hasani

Estis decembro 1961. Shaban sekvis siajn studojn en la eksa Teknikumo pri Konstruado en Tirana. Li devenis el la vilaĝo Petkaj de la regiono de Malziu (Kukës) kaj revis fariĝi konstruisto. En la kulturdomo "Ali Kelmendi" en Tirana li legis anoncon, laŭ kio tie estis malfermita lernokurso pri Esperanto. En la mezlernejo li studis fremdlingvon, samkiel ĉie en la lando, la rusan. Li sin demandis: kio estas Esperanto? La saman scivolemon havis ankaŭ mi, kiam mi estis gimnaziano en la lernejo "10 Korriku". Ni estis amikoj, tiel ni enskribiĝis en la lernokurso, kiun gvidis aĝulo moviĝanta per bastono. Li estis la inĝeniero Ĉefo Fico.

Alia pasio de Shaban tiutempe estis la beletro. Li ĵus estis finverkinta amnoveleton. Tion ni proponis por provlegi al la renoma verkisto (Dhimitër Shuteriqi) tra ties filino, Mira, same gimnaziano en mia lernejo "10 Korriku". Kaj la verkisto respondis post iom da tempo tre afable, tre detale, konsilante la junan verkiston Shaban per kuraĝigaj vortoj.

Esperanto daŭre restis la pasio de Shaban, ankaŭ dum la soldatservo kaj la universitataj studoj.

verkis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Lia korespondo estis tre vasta kun la eksterlandaj esperantistoj, kio atentigis ankaŭ la sekretajn servojn en la urbo de Kukës. Pro tio Shaban ĉesigis la korespondadon. Sed li daŭrigis tion post la jaro 1990.

Ekde pluraj jaroj Shaban gvidas la Albanan Esperanto-Asociacion kaj estas delegito de UEA.

Jen kion skribas li pri si mem:

"Mi naskiĝis la 23-an de Julio 1945 en la vilaĝo Petkaj, regiono Malzi, distrikto Kukës. La sepjaran lernejon mi sekvis la en naskiĝloko, Shëmri. Dum 1960-1964 mi studis en la Teknikumo pri Konstruado "8 Nentori", Tirana, post kiam mi akiris la titolon "Mezgrada Teknikisto de Konstruado" en la fako "Domkonstruaĵoj". Ekde la 15-a de Julio 1964 ĝis la 13-a de majo 1965 mi estis enpostenigita respondeculo por la sektoro de investaĵoj en la Industria Entreprenejo "Sharra" (Segejo) en Shëmri.

Poste, ĝis la 30-a de aŭgusto 1979, mi deĵoris kiel konstrua teknikisto en la Ŝtata Konstrua Entreprenejo en Kukës, (same dum la dujara soldatservado 1966 ĝis 1968, kiam mi gvidis diversajn armeajn konstrulaborojn).



De 1970 ĝis 1975 mi sekvis la universitatajn studojn en la Fakultato pri Konstruĝinĝierado en la fakto: civilaj konstruaĵoj, Industriaj, vojoj-montoj).

De 1983 ĝis 1988 oni enpostenigis min ĉefinĝiniero ĉe la Konstrua Entrepreno- Kukës kaj poste ĝis 1991, ĉe la Entrepreno de Komunumaj Servoj de la urbo.

Unu jaron mi estis direktoro en la Urbodomo de Kukës kaj du pliajn jarojn direktoro de Entrepreno pri Irigaciado.

En 1994 mi fondis mian privatan entreprenon "Simon shpk", kiun mi gvidis ĝis 2008. Poste mi deĵoris kiel teknika gvidanto en aliaj privataj konstruaj entreprenoj en Tirana.

La Nacia Parlamento, en la jaro 1986 honoris

min per "Ordeno de Laboro Tria Klaso" Kiam oni konstruis, ekde la komenco, la novan urbon de Kukës (tiam la granda elektra energia centralo de Fierza sur la rivero Drin postulis akvobasenon, kiu kovris la malnovan urbon), mi okupiĝis pri la starigo de multaj objektoj sociekonomiaj kaj kulturaj, konstruataj en ĝi."

S-ro Shaban estas verkinta interesan monografion pri la regiono de Malzi, pritraktantan diversajn aspektojn historiajn, etnografiajn, ekonomiajn, ks.



verkis kaj sendis
Bardhyl Selimi el Albanio

Dek tri manieroj rigardi merlon

verkis kaj sendis Lode Van de Velde el Belgio

Elstara, enhave riĉa poemo de Wallace Stevens (Usono, 1879-1955), unue publikigita en 1917, inspirita de hajkoj, kaj konsistanta el 13 versoj en kiuj merlo ludas rolon, observata de pluraj perspektivoj.

I
Inter dudek neĝaj montoj,
La sola moviĝanta afero
Estis la okulo de la merlo.

II
Mi havis tri pensojn,
Kiel arbo
En kiu estas tri merloj.

III
La merlo kirligis en la aŭtunaj ventoj.
Ĝi estis parteto de la pantomimo.

IV
Viro kaj virino
Estas unu.
Viro kaj virino kaj merlo
Estas unu.

V
Mi ne scias, kion preferi,
La belecon de la modulado
Aŭ la belecon de aludoj,
La fajfadon de la merlo
Aŭ tuj poste.

VI
Glacikonusoj plenigis la longan fenestron
Kun barbara vitro.
La ombro de la merlo
Pasis ĝin, tien kaj reen.
La humoro
Markita en la ombro
Nedeĉifrebla kaŭzo.

VII
Ho magraj viroj de Haddam ¹,
Kial vi imagas orajn birdojn?
Ĉu vi ne vidas kiel la merlo
Paŝas ĉirkaŭ la piedoj
De la virinoj ĉirkaŭ vi?

VIII
Mi konas noblajn akĉentojn
Kaj lucidajn, neeviteblajn ritmojn;
Sed mi ankaŭ scias,
Ke la merlo estas enplektita
En ĉio kion mi scias.

IX
Kiam la merlo forflugis eksternive,
Ĝi markis la randon
De unu el multaj cirkloj.

X
Ĉe la vido de merloj
Flugantaj en verda lumo,
Eĉ la bordelitoj de eŭfonio
Krius akre.

XI
Li veturis tra Konektikuto
En vitra kaleŝo.
Iam, timo trapikis lin,
Kiam li konfuzis
La ombron de sia verturilo
Kun merloj.

XII
La rivero moviĝas.
La merlo do supre flugas.

XIII
Vesperis la tutan posttagmezon.
Neĝis
Kaj estis neĝonte.
La merlo sidis
Sur la cedro-branĉoj.

tradkuis kaj sendis
Lode Van de Velde
el Belgio



¹ Haddam: *Urbo en Konektikuto (Usono).*



La 23an de junio 2020

ambaŭ ĵurnaloj eble kalkulis laŭ siaj informoj.)



La 23an de junio okazis la memorceremonio de la fino de la Okinava Batalo dum la dua mondmilito. La ĉi-jara ceremonio estis malgrandskala pro la koronavirusa epidemio, kaj




la ĉefministro ne ĉeestis, nur sendante mesaĝon tre malvarman por la koro de okinavanoj.

Dum la dua mondmilito ĉiuj bataloj krom en Okinavo okazis ekster Japanio, ĉar ĝi estis invado milito de Japanio. Ĝi okazis komence en Ĉinio, kaj poste la batalejoj disvastiĝis en la tuta Azio kaj Pacifiko. En 1945 la japana malvenko estis klare videbla por ĉiuj, sed

la registaro rifuzis kapitulacii. Usono komencis bombardi ĉiujn ĉefajn urbojn en Japanio kaj fine, komence de aŭgusto ĝi bombis Hiroŝimon kaj Nagasakion per atombomboj. Kaj en la sama periodo usonaj soldatoj surteriĝis en Okinavon kaj tie okazis kruela batalo.

Ĉiuj bataloj estas kruelaj, sed la krueleco de la Okinava Batalo estis alispeca; en ĝi la japana armeo trudis sinmortigon al la loĝantoj, sekve pli ol 1000 mortis.

La insulo le: nombro nekonata
La vilaĝo Jomitan: 130
La vilaĝo Mabuni: 58
La insulo Tokaŝiki: 330
La insulo Zamami: 177
La insulo Keruma: 53



(La supra statistiko aperis en la ĵurnalo Mainiĉi. La nombroj estas malsamaj ol tiuj en la suba artikolo. La oficiala statistiko fare de la registaro ne ekzistas, do

Hodiaŭ mi tradukos artikolojn aperintajn en du ĵurnaloj pri la postvivintoj de tiuj teruraĵoj. Kaj fine mi tradukos poemon prezentitan en la ceremonio.

1. Mi mortis unu fojon

(El artikolo de la ĵurnalo Akahata la 23an de junio 2020)

Fine de la dua mondmilito, kiam la usonaj soldatoj surteriĝis al la insuloj de Okinavo, okazis grupaj sinmortigoj inter familianoj kaj najbaroj, truditaj de la japana armeo, en diversaj lokoj en Okinavo.

La 28an de marto 1945 en la insulo Tokaŝiki 329 loĝantoj kaj la 2an de aprilo 1945 en la korala kaverno en la vilaĝo Jomitan en la ĉefa insulo Okinavo 83 loĝantoj fariĝis viktimoj de trudita sinmortigo.

Tion kaŭzis la politiko de la japana armeo "La armeo kaj la loĝantoj kune vivu kaj kune mortu". La japana armeo edifis la loĝantojn per mensogo, ke se ili estos kaptitaj, virinoj estos seksperfortitaj kaj viroj estos premmortigitaj de tankoj, kaj ne permesis al ili kapitulacii. Ĝi traktis kapitulaciantojn kiel usonajn spionojn. Al iuj loĝantoj estis donitaj mangrenadoj por grupa sinmortigo.

Mi neniam forgesas

"Jam 70 jaroj pasis, sed mi estas obsedata de la okazintaĵo. Foje mi ne povas dormi tutan nokton", rakontas s-ino Kinĵoo Curuko (91-jara).



La familio de Kinĵoo rifuĝis al la monto Oojami, kiam okazis usonaj aeratakoj la 23an de marto, kaj poste, kiam la usona armeo surteriĝis al la insulo Tokaŝiki la 27an, laŭ la ordno de la polico ili moviĝis al la distrikto Kitajama, paŝante dumnokte en pluvo sen manĝaĵoj. Ili ne havis kromajn vestaĵojn, do ili sentis malvarmegon en malsekaj vestaĵoj. Survoje la patro petis al japanaj soldatoj, ke liaj familiaoj paŭzu en la armea rifuĝejo por mallonga tempo, sed la soldatoj malvarme rifuzis tion. La patro kolere diris al si, "La armeo gardas nur sin, sed ne la loĝantojn".

La 28an de marto 1945 komenciĝis grupa sinmortigo. Momenton post kiam s-ino Ŝinĵoo, 15-jara, aŭdis kriegon "Longe vivu la imperiestro!", ŝi estis strangolita de malantaŭe kaj perdis la konscion. >>19

Rite ĉi tiu mateno mi sidas oportune en la leda fotelo aĉetita antaŭ jaroj de la antikvaĵa magazeno “Flandra arto”. Agrablas la sorbata varmega laŭ turka maniero “taatlâ”¹ kafo. La panoramo antaŭ la granda laŭ la tuta ĉambrovasto-fenestro plezurigas min. Sur la falĉita hieraŭ herbejeto de la dekliva korto maldekstre viciĝas grandaj rozarbustoj – oroflavaj, fajroruĝaj je ruĝblankaj makuloj. Plej supre maldekstre je la alteco de la instalita vitlaŭbo kun belaroma vinbero “vraĉanska temenuga” kreskas grimpana maja rozarbeto, kaj dekstre – la tre ŝatataj junarboj magnolio kaj granatujo. Al tiu ĉi agraba bildo aldoniĝas sur la verdherba tapiŝo pluraj ĉarmaj birdoj – etaj paseroj, viglaj paruoj, buntaj garoloj, teneraj kaliopoj, nigraj merloj, eĉ longvostaj pigoj alflugantaj kaj vigle saltetantaj bekas vermetojn, etajn rampantajn rampuletojn kaj ĵetitajn de mi panpecojn. Vera ĝuo kaj kuracilo estas ĉi tiu bunteco, freŝeco, trankvileco kaj aromoj por la homa animo kaj bonstato antaŭ la alvenanta mirinda tago!

Ĝus la TV-parolistino informis, ke hodiaŭ estas granda kristana festo Ĉeriza Rekvientago. Dum ĉi tiu tago la vivantoj honoras la memoron al la forpasintoj – viaj karaj parencoj kaj geamikoj. Invitita pastro de Sofia preĝejo eksplikas, ke dum ĉi tiu grava tago la animoj de la forpasintoj estas plej proksime ĉe ni, inter ni! Honore al ili la ortodoksaj kristanoj (kiaj ni estas) bruligas kandelojn kaj “disdonas” al najbaroj ŝatatajn de la forpasinto ĉerizojn, rite preparitan dolĉan tritikon kaj aliajn manĝaĵojn!

Animstreĉe mi leviĝis, altiris la portreton de juna ridetanta knabo, lokitan sur la antikva komodo. Tremantfingre kaj rezignacie mi bruligis grandan kandelon, metante ĝin antaŭ la enkadrigita portreto. Rigardante liajn senartifikajn okulojn kaj palan vizaĝon malantaŭ la kvieta kandelflameto mi kruccignis. Subite kaj timkonfuzo la flameto ekflagris dekstren-maldekstren ŝajne ies spiro estis tute proksime apud ĝi! Mia koro akcele ekbatis, kaj la rigardo nebuliĝis. Alnaĝis en mian kapon la bildo de hospitala ĉambro: Mi sidas apud la lito. Sur ĝi kun sensanga pala vizaĝo, kuŝas senmova, kovrita per littuko Velĉo post peza operacio.

La profesoro-ĥirurgo post ĉiuj ekzamenoj, esploroj kaj konkludaj opinioj de ekspertizistoj rekomendis pri nepra kaj tuja amputo de la dekstra kruro! Abomena kancero damaĝis kruele la ĉefan oston. Velĉo komprenis la seriozecon de la dolorega malsano kaj demandis min time per tremanta voĉo: “Paĉjo, tamen la profesoro ne tranĉos mian kruron, ĉu

ne?” Per eble plej trankviliga voĉo mi inspiradis esperon, ke la doktoro estas la plej sperta specialisto kaj li faros ĉion eblan por forigi NUR la difektitan parton de la ostoj! Sed samtempe, interne, mia koro disŝiriĝadis pro mia koscia mensogtrankviligo!

Kiam mia plej kara knabo vekiĝis de la anestezo kun hororigitaj okuloj ekplorĝemis: “Paĉjo, kie estas mia kruro, o, o?” kaj daŭre kordetruie lamentis... Sensukcese mi povis stopi miajn patrajn larmojn, samtempe penklopodante trankviligi la suferantan kruele mian infanon! Li estis nur 13 jara!

La fiksita mia rigardo en la kandelflameto per sia periferia vidkapablo vidis sur la herbejeto krom la rapidkrurajn paruojn kaj merlojn en la sama momento la alflugon de la du konataj nigro-blankaj pigoj. Ili aspektis ŝajne vestitaj kun blankaj ĉemizoj kaj nigraj redingotoj. La unua birdo paŝis pavece, kvazaŭ prezidento V.Putin eniras per sia specifa ceremonia marŝado en solenan halon de Kremlo larĝe kaj ritme movigante la dekstran manon! La dua pigo ne paŝis, sed saltetis antaŭen kaj ĉiam apogis sin per aloj kaj vosto. Ĝis hieraŭ en la nefalĉita herbo ĝiaj desaltetoj kaj skuiĝetoj estis nerimarkeblaj. Ĉi foje la birdo alteriĝante kaŭriĝis apogante sin per la dekstra alo. En la sekva momento ĝi leviĝis kaj eksaltetis direkten al la proksima panpeco. Kaj mi ŝtoniĝis pro surprizo! Ho, Dio mia – la kompatinda pigo estis kun nur UNU KRURO! En ĝiaj saltmaniero kaj disetendo de la aloj per teruro mi kvazaŭ vidus mian neforgeseblan filon Velĉo hejme disetendinte la brakojn balanciĝante sian saltadon per unu kruro antaŭ ol havi apogbastonojn! Doloro kaj larmoj sufokis mian gorĝon. En tiu ĉi Rekvientago mi komprenis, ke la unukrura pigo estiĝis haveno por la amata animeto de mia delonge forfluginta filo al Diaj Ĝardenoj!

Angora respirado, sed samtempe milda sento instigas min prizorgi, nutri, ĝojigi la pigon kaj ĝiajn najbarajn birdojn kaj kutimigi ilin esti pli ofte antaŭ mia granda fenestro beldekorante la ĝardenon!

¹ plej eble dolĉa kafo

vera rakonto de **Petar Todorov** el Bulgario
honora prezidanto de Esperanto-Bulgario



Kian opinion vi havas pri nia medio, ho Philologos, filo de Aristomachos?

Philologos ĉirkaŭrigardis en la Forum Romanum. En la fono, antaŭ la Concordia templo, granda amaso staris ĉirkaŭ la rostra. Sur ĝi oratoro laŭtlegis la nomojn de la proskribitoj de Sulla. Amasiĝis ĉiam la samaj tipoj: sovaĝaspektaj feĉuloj kun gorilaj trajtoj, kiuj klopodis ekkapti per la oreloj kelkajn konatajn nomojn, ĉar la proskribitojn kiu ajn rajtis mortigi kaj liajn bienojn ricevis la murdinto.

Philologos kaj Biblophagus sidis ĉe la kontraŭa fino de la placo sur la ŝtuparo de la Basilica Aemilia Paulli kaj videble ne interesis ilin, kiujn la senato deklaris la malamikoj de la respubliko.

- Kion mi povus diri novan al vi, Biblophagos? - li respondis ŝultrolevante. - Tiuj multaj konstruaĵoj tre similas al nia Akropolis. Ĉio estas tre simila al la niaj kaj tamen kiom da diferenco! Ĉar kio estis la ĉefa ornamaĵo de la Akropolis? La statuo de la diino de la saĝo. Kaj nun rigardu tion! - li diris, montrante el la statuo, staranta sur pilastro, apud la ŝtuparo. - Kion vi vidas tie? La lupinon kaj sub ĝia ventro la ĝemelojn, suĉantajn la lakton de sovaĝbesto, por ke jam la fondado de la urbo komenciĝu per fratmurdo.

- Prave vi diris, ho Philologos. Kaj ne forgesu, kiome diferencas ankaŭ la popolo ĉi tie kaj tiu de la Atena agora. Tiu estis popolo, kiu vere kapablis krei la Akropolon. Tiun ĉi kanajlaron kungregigis nun la sangodoro kaj la predavido, dum ni kunvenis sur la agora por ĉirkaŭstari nian majstron, la honorplenan, maljunan Kleistos, por esti riĉigitaj per kelkaj saĝaj frazoj, kiujn ni rapide notis sur niaj vakstabuloj. Kaj ĉu vi memoras, kia ĝojo estis al ni ekvidi la cinikan saĝulon, Hekateonon? Li vagadis la stratojn ĉiam malpure, en ĉifonaj vestoj, konforme al siaj principoj. Ni postkuris lin kaj petis veni al nia rondo, konversacii kelkajn vortojn kun nia majstro, por ke ni povu ĝui la diskuton, kies ĉiu vorto signifis ĝojon al la malsata animo, kiel la festeno de la dioj por sklavo. Kvankam ja ni estis ankaŭ korpe malsataj, konsidere, ke ni dediĉis niajn vivojn ne al akaparo de oro, sed por la filozofio kaj ni estis tre feliĉaj, se ni, elpreninte la ledan saketon el sub nia vestaĵo, trovis en ĝi kelkajn rostitajn fagoglanojn. Sed kial fari zorgojn pro tio, kiam nia animo ĝuis dian festenon! Kiam Kleistos kaj Hekateon diskutis pri la temo, kio estas la virto kaj justo! Kaj se ni, sekvante nian majstron, iris al la teatro, tie ni vidis same nin mem, ĉar la komedio primokis niajn majstrojn, aŭ la korifeojn de la publika vivo. La primokitoj ridis des pli gaje, ju pli trafan satiron ili aŭdis pri si mem. La popolo aplaŭdis same al la aktoroj, kiel

al la verkisto kaj al tiuj, pri kiuj ili ridis. Ĉu vi memoras? Okazis, ke iu riĉa bakisto, enviante la famon de la primokitoj, promesis abundan premion al la verkisto, se li foje eĉ lin mem primokos. Sed trafe li ricevis laŭ sia merito! La verkisto figuris lin kapropieda satiruso, kiu venas al la urbo, ekvidas la pilorion, kredas ĝin esti trono kaj suprengrimpas. La amaso ekvidante lin, komencas alĵetadi putriĝintajn bulbojn kaj koton, dum li ĉion ĉi imagas honorigo kaj kiam la provoso volas lin descendigi, li donas al li monon por lasi iome ĝui sian favoritecon.

Ambaŭ ridis.

- Prave vi parolis - diris Biblophagos. - Vere, Perikles estris dum deksep jaroj la urbon, ĉar ĉiu civitano estimis lin. Li ĉiam portis kaskon, ĉar ĝi decias al lia staturo. Kaj, se sur la scenejo aperis aktoro kun korbego, aŭ fela vinujo sur sia kapo kun grandegaj okultruoj, la aŭskultantaro jam ridis plenbuŝe, ĉar ĉiu ekkonis, kiun li volas imiti. Li iris kun aplombegaj paŝoj al la mezo de la scenejo, tie depuŝis la dion Zeŭs de sur la trono kaj li mem eksidis. Transprenis la fulmosagojn de Zeŭs, pikis tiujn al Pallas Athene, elŝiris la lancon el ŝia mano, derompis ĝian oran pinton kaj transdonis al la aktoro, kiu ludis la rolon de Aspasia. Fine Aspasia simple formanĝis la oron. Nu, la kronikistoj notis, ke ĝuste Perikles estis, kiu plejkore ridis la scenon.

- Jes, ĉar li sciis, ke ĉio ĉi estas nur ŝerco, ĉar li neniam klopodis al tiraneco kaj li neniam ŝtelakiris unusolan drakmon de la popolo.

- Ĝuste pro tio. Sed ekprovu nur primoki iun banditestron ĉi tie! Tuj vi estus krucumita, ĉar ne troviĝas akuzo, ekde la rabado, ĝis la patromurdo, aŭ de la vanteco ĝis la plej fia krueleco, kiu ne trafus ilin tute prave. Rimarku firme, Philologos: se iu postulas al si honoron, indan al la senmortaj dioj, tiu faras, ĉar li bone scias sian malindecon kaj senhonoron. Tial estas, ke en la cirko nur la gladiatoroj murdas sovaĝbestojn aŭ unu la alian, dum la muzoj larmas kaj katenite silentas. Sed imagu nur, kia sensacia sceneja figuro povus esti modelita pri tiu verukvizaĝa Sulla! Oni povus priludi, kiel li suĉas la lupinon, kiel li hurlas pro tio lupmaniere kaj ĵetas sin hurle al Grekio por suĉi ĝian sangon.

- Kaj ankaŭ la lakton, ho Biblophagos! Ĉar ne forgesu, ke Sulla tre bone parolas greke. Li eĉ skribas. Memkompreneble siajn proprajn heroaĵojn, ĉar ili havas kapablon nur al tiaj verkaĵoj. Sed eblas, ke eĉ tion li nur verkigas per iu heleno, kiu nun kontraŭ valora mono priskribas, kiel lia mastro elrabis niajn templojn kiel li disrompigis la statuojn kaj kiom

glorplene li forbruligis niajn librarojn. Se tiuj ĉi ne suĉus nian lakton ili jam eĉ ne vivus.

- Prave, mia amiko. Mi ankaŭ miras, ke ili ankoraŭ ekzistas. Antaŭ nelonge Marius ekstermadis siajn kontraŭulojn same, kiel nun Sulla. Marius jam estas mortinto kaj nun sekvas lin liaj kunuloj. Sed ĉu eblas ŝtaton vivteni per ĉiama renverso de la saĝo kaj justo? Ĉu vi memoras, kiel difinis Platono la justan vivon?

- Ke ĉiu faru kaj ricevu tion, kio lin koncernas.

- Prave vi diris. Sed se ĉiu akiras tion, kio koncernas aliulojn, kiel finiĝos la procedo? Reciproka rabado kaj ruinigo ĝis la plena pereco. Ĉu vi kredas daŭran regadon al Sulla? Ĉu vi imagas, ke unusola homo povas leviĝi super ĉiu alia kaj povas senbride subpremi ĉiun aliulon? Ne, Philologos, tio ne eblas, ĉar fine murdos lin iu el lia propra kliko. La perforto neniigas sin mem. La balancilon oni povas ekpuŝi, ke ĝi svingiĝas supren, al iu finpunkto, sed klopodas malsupreniĝi al la kvietpunkto. Kaj vane vi provas starigi la kubon sur ĝia rando, ĉar la dioj ordonis, ke ĝi povu stari nur sur la platoj. Nur tia socio staras sur firma bazo, kiun gvidas la menso kaj scio, kiel ofte rakontis al ni nia majstro, laŭ la doktrinoj de Platono. Nek la sangavida kanajlaro de la circus maximus, nek la eĉ pli sangavidaj banditestroj povas, aŭ povos iam ajn gvidi kaj subteni ŝtaton. Ĝuste tial akcentis Platono, ke la ŝtato povas esti regata nur flanke de la saĝuloj, al kiuj estos malpermesite akiri havaĵojn. Ili ne rajtos droni en plezuroj, por ke ne venenigu iliajn korojn la akaparemo, malamo, intrigo, insidemo. Kaj el ili neniuj povos leviĝi super siaj kolegoj por eviti la tiranecon kaj la putriĝon de la puraj virtoj. Jes, mia amiko, tia ĉi estas la perfekta ŝtato.

- Kaj tiu ŝtato devas nepre alveni, ĉar ekzisti povas nur afero, kiu estas laŭmensa.

- Prave Philologos. Ĉu vi scias, kiel sanigas la chirobantikaj pastroj la histeriajn virinojn?

- Jes. Per fajfinstrumentoj ili ludas furiozan dancmuzikon kaj igas la malsanulinon dancegi, ĝis ŝi terenfalas kaj profunde endormiĝas.

- Vere. Kaj post la vekiĝo la malsanulino trankviliĝas. Nu, ĉi tie, ĉirkaŭ ni okazas la sama: ĉefbanditoj dancigas la popolon ĝis la plena senluziĝo kaj tiam sekvas la saniĝo: la popolo trankviliĝos, eknaŭzos la sangon, rifuzos la pluan inferan spektaklon kaj alvenos la regado de la menso, ĉar alimaniere ne eblas. Tiam la homoj kontentiĝos per freŝa tritikpano, kiun oni altabligas sur agla mato, krome manĝos ili fromaĝon, salan olivberon, bulbon, figon: eble ili altrinkos vinon, dum iliaj lipoj kantos la gloron de la senmortaj dioj kaj poste ili ekkuŝos en betullignaj litoj, sur kuŝejoj, faritaj el mirtaj branĉoj. La

akaparemo kaj gloravido neniun incitos kontraŭ lia homfrato, ĉar la saĝo iluminos la cerbojn, ke la virto estas pli utila al ili.

- Ho, jes. Ni, saĝuloj, bone scias, ke troviĝas nur unusola potenco: la menso. Rigardu ĉi tien, ho Biblophagos: ĉi tiu ŝtuparŝtono iome suprenleviĝis ĉar sub ĝi kreskaĵo etendas siajn radikojn. Sed kio donas al ĝi la forton por tio? La menso, la animo! La logos. Prave diris Thales, ke en ĉiu herbeto loĝas dio, ĝia propra dio, kiu igas ĝin kreski. La kruda forto estas nur servisto, dum la reganto estas la logos, la leĝaro de la menso.

- Kaj la perforto devas kliniĝi antaŭ la menso. Ju pli arde furiozas la despota perforto, des pli frue ĝi renversas sin mem kaj helpas surtronigi la menson. En la kortego de Sulla jam nun ĉiuj tremas kaj neniuj estas certa pri sia vivo. Kelkuloj provas firmigi siajn poziciojn, ke ili klopodas eĉ superi la ordonojn de Sulla kaj distingiĝi per trofervora murdado. Sed kio estas premio? Ke sekvontage Sulla sendas lin al la eŝafodo por malebligi konkurencon. Sulla de tempo al tempo ĉirkaŭrigardas en sia rondo, kaj, se iu kapo komencas elstari el inter la ceteraj, tuj li dehakas. Sed la malkonfidon kaj pli-malpli frue troviĝos ŝtelmurdisto, kiu mortpikos lin, por savi sian propran vivon. Eĉ duonjaron mi ne aŭguras al lia regado. Kaj post li sekvos regado de la saĝo.

- Jes. Unusola potenco estas la menso. La logos.

- Jes. La saĝo. La nous. Kaj tiun reprezentas ni, helenaj saĝuloj en ĉi tiu barbara lando. KREDU Philologos, ke la urbo kuŝas jam nun antaŭ niaj piedoj! Sed tamen ni ne surtretos ĝin, nur gvidos laŭ la volo de la virto, dece al saĝa kaj bonintenca reĝo... Ve!

- Ve! - kriis ankaŭ Philologos.

Ambaŭ eksentis fortan piedbaton sur siaj dorsoj. Ektime ili turniĝis, sed jam torentis la mallaŭdo el buŝo de Stultius, la etiopa inspektoro de la sklavoj:

- Fi! Mizeraj, kanajlaj sklavoj! Ĉu vi tie ŝtelados la tempon, kiam mi ordonis al vi, tuj marŝi al la monto Janiculus por paŝti la brutaron? Prave mi asertis al nia mastro, la nobla kaj grandanima Caius Publius Valerius, eĉ unu moneron ne elspezi por tiaj mizeraspektaj sengrasuloj, ĉar ili estas pigraj kiel pediko. Se atendu nur, mizeraj sentaŭguloj, mi regalos vin! Klakos la vipo hodiaŭ sur viaj dorsoj! Ek!

Ambaŭmane li ekkaptis la ferringojn, forĝitajn sur la koloj de la sklavoj, suprentiregis ilin kaj piedbatante, skuadante puŝadis ilin tra la tuta forumo. Atinginte la templon de Saturnus, li denove traktis ilin per piedoj kaj forlasante, irigis ilin al la monto, akcentante, ke ili iru laŭ la plej mallonga vojo, tra la ponto de Probus kaj antaŭ krepusko ili prezentu sin hejme, por ricevi la vipon.

La du sklavoĵ veante, lamante marŝadis laŭ la Vicus Jugarius. Kaj iliaj veadoj intermiksiĝis kun la stertorado de tiuj kvarmil damnitaj militkaptitoj, kiujn ĝuste tiam buĉadis la legianoj, konforme al la ordono de Sulla.

(1961)

rakonto de **Sándor Szathmári** el Hungario

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Szathmari/index.html>

Por venki rugbeajn miksbatalojn...

Vi naskiĝis nudpiede. Vi faris viajn unuajn paŝojn surhavinte vian unuan paron da ŝuoj. Vi portis ŝuojn dum kresko. Nuntempe, vi estas plenkreskulo kaj vi ŝatas kuri sporte. Por kuri vi portas ŝuojn de alta teĥnologio, ŝuoj kies plandumoj estas plenigitaj per ŝaŭmkaŭĉuko. Lutage vi scivolas, kial viaj piedoj kaj genuoj doloras tiel ofte. Eble viaj kurŝuoj ne estas sufiĉe kusenaj? Eble ekzistas aliajn kurŝuojn, kiuj havas pli bonajn plandumojn?

Aŭ eble la problemo estas la ŝuoj mem.

En la fako de sportkurado ekzistas du malsamajn skolojn pri konkurso-piedvesto: la "ŝupieda" kaj la "nudpieda". Sekvantoj de la skolo "ŝupieda" diras, ke modernaj desegnoj de ŝuoj donas al kurantoj saltefikon kaj komforton, kiuj multe kontribuis al la kresko kaj sukceso de la sporto. La sekvantoj de la skolo "nudpieda" opinias, ke la homoj estas naturale nudpiedaj kaj ili evolvis por kuri senŝue.

D-ro Peter Francis, de la Karlovo Instituto de Teknologio en Irlando, traserĉis la sciencan literaturon por trovi, ĉu ekzistas sufiĉe da sciencaj indikaĵoj por determini tiun, kiu estas la plej bona skolo inter la "ŝupieda" kaj "nudpieda". Dum recenzo de ĉirkaŭ 100 eldonitaj studaĵoj pri kuradovundoj, D-ro Francis esploris la naturalan kapablecon de piedoj absorbi la skuon de kurpaŝoj. Li samtempe klopodis kompreni, ĉu modernaj kurŝuoj havas negativajn efikojn kontraŭ la natura meĥanismo de skuoabsorbo de piedoj. Liaj malkovroj estis surprizaj: kurantoj havas malpli da vundoj, kiam ili kuras nudpiede.

Naturele, piedoj havas tendencojn kaj ligamentojn tiujn, kiuj streĉas kaj reslatas kiam oni kuras. Tiu kapablo de la piedoj povas milde sorbi la energion estiĝatan de la ŝoko elvenanta de la piedo frapanta la teron. Por bone profiti de tiu kapablo, la antaŭa parto de la piedo devas tuŝi la teron antaŭe la kalkano. Tiu maniero de kurpaŝo evolvis dum ses milionoj da jaroj inter primatoj.

Ekde la '70aj jaroj kurado ne plu estas la sama. Homoj inventis kusenajn kurŝuojn, kiuj donas pli grandan artefaritan skusorbecon kaj saltefikon al la kuranto. Pro tio, milionoj da homoj eniris la sporton kaj nova industrio naskiĝis: Nuntempe, modernaj kurŝuoj estas simboloj de personeco kaj prospero. Tamen, la kosto de tio estas, ke kurantoj apartigis sin de sia

verkis kaj sendis marioo el Kanado

natura fizologio. Per modernaj kurŝuoj, oni devas uzi malsaman manieron de kurpaŝo: La kalkano tuŝas la teron antaŭe la antaŭa parto de la piedo. Tielmaniere, la skuo kontraŭ la kalkano estas multe pli granda ol la alia pli naturala maniero de kurpaŝo.



Kvankam la specoj de vundoj, kiam oni uzas modernajn ŝuojn, dependas de multaj faktoroj, kiel staturo, sekso, aŭ aĝo de la kuranto, kelkaj vundoj aperas pli ofte ol aliaj. Tiuj estas planda fasciito, tibia periostito, kaj dorsdoloro.

D-ro Francis rekomendas, ke trejnistoj inkludas nudpied-ekzercojn en trejnprogramoj. Pere de tiaj ekzercoj, la kurantoj sentos, kiel iliaj piedoj funkcias naturale. La kurantoj prenos pli bonan pozicion de korpo kaj disvolvos pli bonajn kurteĥnikojn. Tiamaniere kurantoj antaŭforigos multajn specojn de vundoj.

Fonto: **Francis P, Schofield G.**, *BMJ Open Sport & Exercise Medicine* 2020



Bildo: **Pixabay.com**

verkis kaj sendis **marioo** el Kanado



Solvo de la
krucvortenigo

	T	E	M	P	O
P	O	L	A	R	A
A	N		L	E	Z
G	I	B		N	O
A	K	U	T	A	N
S	A	T	O	S	

El la libreto „**ESPERANTO NE ESTAS NUR LINGVO**“ de Spomenka Štimec (la zagreba metodo), legaĵo post la baza kurso, **KEL, Zagreb, 2002, Sepa leciono**

ESPERANTO-GAZETOJ

„Ĉu vi deziras aboni iun Esperanto-gazeton?“

„Kion signifas aboni?“

„Aboni signifas antaŭpago por la tuta jaro iun periodaĵon, kiu poste venos al via adreso.“

„Kie oni povas pagi por Esperanto-periodaĵo?“

„Vi povas sendi monon al gazet-peranto. Tio estas persono, kiu peras la gazeton inter la redaktejo kaj la legantoj. En Esperanto-gazetoj vi ofte povas trovi la liston de perantoj. Per perantoj vi povas aboni.“

„Kiujn gazetojn mi povas aboni?“

„Mi prezentos al vi kelkajn gazetojn, kaj vi povas mem decidi, kiu estus la plej bona por vi. **Juna amiko** estas revuo por lernejoj kaj komencantoj.

Kontakto estas revuo por gejunuloj. Gejunuloj membras en TEJO. TEJO estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. **Monato** estas internacia revuo el Antverpeno en Belgio pri politiko, kulturo kaj interesaĵojn artikolas esperantistoj el diversaj landoj. **Eventoj** estas internacia gazeto el Budapeŝto. La revuo **Esperanto** estas tre grava revuo de Universala Esperanto-Asocio. **Heroldo de Esperanto** havas tre longan tradicion.

„Kio estas tiu Universala Esperanto...?“

„Esperanto ne estas nur lingvo. Esperanto estas ankaŭ organizo. La plej granda Esperanto-organizo estas Universala Esperanto-Asocio. Ĝia centro estas en Nederlando, en Roterdamo. Esperantistoj povas aliĝi al la organizo kaj regule ricevi informojn pri la novaĵoj en la Esperanto-mondo.“

„Kiel mi povas aliĝi al la organizo?“

„Vi devas sendi kotizon al UEA.“

„Kion mi devas sendi?“

„La kotizon. Kotizi signifas pagi monon en komunan kason.“

„Mi komprenas. Estas multaj novaj vortoj tie: peranto, UEA, kotizo.“

„Jes, estas bone koni tiujn vortojn de la Esperanto-Movado.“

„Kion mi elektu?“

„Mi donos al vi librokatalogon kun la prezoj de gazetabonoj. Studu la prezojn kaj poste decidu.“

Pri la historio de la arta lumo -
G.Kurucz, Hungario



La homo estas la sola vivulo, kiu scias estigi lumon, sed ĝia deveno perdiĝas sen postsignoj, en la profunda malproksimo de nia historio.

Laŭ pragreka mito, Prometeo ŝtelis la fajron disde la dioj, ĉar sciis, ke la fajro estas fonto de dia povo. Kiu regas la fajron, tiu regas super la fortoj de la naturo. Ne estas do mirinde, ke la scipovo lumigi la ĉirkaŭaĵon delonge interesas la homaron.

La unua lumigilo estis fajrejo: loko, kie aparta grava persono zorgis pri konstanta fajro.

La portebla lumigilo estis granda paŝo antaŭen. La unua „lampo“ estis trovita en Suda Francio, kaj ĝi havas la aĝon de ĉirkaŭ 15 mil jaroj. Ĝi konsistas el kavigita ŝtono. Verŝajne, graso aŭ sebo nutris la fajron de la „lampo“.

Antaŭ ĉirkaŭ 5 mil jaroj, en Egiptujo, oni uzis tre belajn metalajn vazojn por lumigado, sed ni ne scias, kio nutris ilian fajron.

En la 4-a jarcento, riĉuloj ekuzis vaksajn kandelojn kiel lumigilojn.

La Nederlanda urbo Hago estis la unua, sur kies stratoj aperis publikaj lumigiloj, en la jaro 1673. Baldaŭ sekvis ĝin Parizo, kiu iĝis la „urbo de la lumo“.

La unua gasa lampo eklumis en la laborejo de apotekisto en Würzburg (Virzburg) en 1786. Oni longe opiniis, ke la gaso estas la plej perfekta lumigilo.

Ĝi elpuŝis la antaŭajn lumofontojn. Sed eksplodoj pro gaso atentigis la homaron pri ĝia danĝero.

Revolucia turno ekestis en 1854. Heinrich Grebel, horloĝisto el Hannover, kiu loĝis poste en Nov-Jorko, faris la unuan elektran lampon. Ĝi konsistis el boteleto por parfumo, kaj el du karbiĝintaj bambuaj bastonetoj. Li estigis vakuon en la boteleto, kaj ligis la finaĵon de ambaŭ bastonetoj al pilo. Ekestis lumo sen fumo kaj malbona odoro.

Tamen oni konsideras kiel patron de la elektra lampo ne la horloĝiston H.Grebel, sed la faman usonan inventiston Thomas Alva Edison. Li elpensis, interalie, la fonografon, la projekciilon por mova filmo kaj, en la jaro 1879, li pendigis 60 lumantajn elektrajn lampojn sur arboj de la Menlo-parko en Nov-Jorko.

De tiu aŭtuno, la elektra lampo multe perfektigis; sed ĝi ne ŝanĝiĝis esence. Ĝi iĝis nia ĉiutaga amiko.

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotová